


V-19499

Bulgara **ESPERANTISTO**



7-8
1975



Partoprenantoj en la E-kursoj de juristoj en Sofio (vd. p. 5)



Hin Hok Srin en infanĝardeno en Razgrad (vd. p. 5)

Junpioniroj-esperantistoj en u. Madan post partoprenco en
tutpopola manifestacio



ENHAVO

- * * Al la XI kongreso de BKP —
kun indaj faro, !
- * * Deklaro de CK de BEA
- * * Ondo de E-aranĝoj: 50 ja-
riĝo de „Mondamikeco“ — Ĉirpan.
E-ekspozicio de infandeseĝnaĵoj.
50-jaroj de Esperanto en Dálboki.
E-renkontiĝo en Razgrad. E-ren-
kontiĝo sur la Balkano. Gravaj
sukcesoj de Esperanto inter la
juristoj en Sofio. Unikaĵo: Festo
de la Rozoj. Esperantistoj-scienc-
istoj el Britlando ĉe ni. Ekster-
landaj gastoj en Ŝumen. Ĥoro
„Nigra Maro“ kantas 4—7
- Ĥrima. Oni nomis lin Koĵuh 8
- * * Granda bulgara verkisto 13
- Ivan Vazov. La emocioj de Rada
(Fragmento el la romano „Sub
la jugo“) 15
- Orlin Orlinov. Nenio estas forge-
sita! Tradukis Asen Grigorov 19
- A. Stecenko. Tri renkontoj 22
- Pavel Matev. Medito pri la patrio.
Tradukis Tempesto 25
- N. Ĥejnova. Patriotoj 25
- Stanka Penĉeva. Unu malfrua dolĉa
amo. Junulinojn mi ne timas.
Tradukis Pr. Prodanov 26
- Nevena Nedelĉeva. Patrino 26
- Georgi Miĥalkov. La brigado de
Kaliakra 23
- Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev. Interling-
vistika utopiismo 28
- Nevena Aleksieva. Por via lingva
perfektiĝo 31
- * * Letero de d-ro L. L. Zamenhof 32
- * * Deziras korespondi IV

Sur la kovrilpaĝo!

Ivan Vazov — klasikulo de la bulgara
literaturo

**AL LA XI KONGRESO DE BKP — KUN INDAJ FAROJ!**

La Dekunua Kongreso de la Bulgara Komunista Partio okazos de la 29 de marto ĝis la 2 de aprilo 1976. La laboruloj en nia respubliko atendas ĝin kun granda intereso.

La kongresoj de BKP estis ĉiam grava evento en la vivo de nia popolo, ĉar ĉiu el ili markas novan etapon en la ekonomia, politika, kultura kaj socia disvolviĝo de la lando. Ĉiu partia kongreso estas trarigardo de la pasita vojo fare de la bulgaraj komunistoj kaj la tuta popolo en la batalo por konstruo de socialisma socio. Tamen ĝi estas trarigardo ne nur de la atingitaj sukcesoj, sed ankaŭ trarigardo de niaj nesolvitaj demandoj kaj problemoj, pridiskuto de la maturiĝintaj taskoj de nia evoluo. Tial, donante sencon al la vojo, trapasita de la lando, la partia kongreso detale kaj science fiksas la perspektivojn de nia estonta disvolviĝo. Tiamaniere ĝi direktas la kreaĵn fortojn de la tuta popolo al novaj konstrufaroj en la nomo de la paco, de la homa feliĉo kaj prospero, de la internacia kompreniĝado.

Laŭ sia signifo la Dekunua Kongreso de BKP ankaŭ estos grava etapo en nia disvolviĝo. Ĝi ne nur daŭrigos la linion de la Aprila Plenkunsido de CK de BKP kaj de la Deka Kongreso de la Partio, sed ĝi donos ankaŭ sian kontribuon por la plua konstruado de matura socialisma socio ĉe ni. Tial la Kongreso, kiu kolektas en fokuson la noblajn strebojn de la tuta popolo, gvidata de la Komunista Partio, vekas altan politikan kaj laboran supreniĝon. La potenca tutpopola movado, esprimita en la socialisma konkurado por inda renkonto de la Dekunua Kongreso de BKP, trovas konkretan manifestadon en la kreaĵoj penadoj de laboristoj, vilaĝanoj, popola intelektularo transformi la nunan lastan jaron de la Sesa Kvinjara Plano en jaron de plej altaj laboratingoj, plenumi kaj superplenumi la Sesan Kvinjaran planon.

Nun tasko de la taskoj estas la batalo por plua plialtigo de la socia laborproduktiveco, la batalo por pli efika utiligado de la produktaj fondusoj, la batalo por pli ŝparema elspezado de la materialaj, laboraj, financaj kaj aliaj rimedoj, la batalo por alta disciplino kaj scienca metodo, por alta kvalito de la produktaĵo ktp.

La bulgaraj esperantistoj, sange ligitaj kun sia popolo kaj kun la batalo por konstruo de matura socialisma socio ĉie — en la uzinoj kaj konstruobjektoj, sur la kampo kaj en la oficejo, penadas esti en la unuaj vicoj de la konkurado por inda renkonto de la partia kongreso. Por ĉiu bulgara esperantisto nun supera civitana devo estas mobilizi ĉiujn fortojn, manifesti sian kreaĵan iniciatemon kaj funkcilgi tiujn rezervojn, kiuj ĝis nun estis kaŝitaj kaj

neutiligitaj. Tiamaniere ĉiu esperantisto, kiel vera patrioto kaj internaciisto, donos sian kontribuon por la plua materiala kaj kultura prospero de nia popolo en la batalo de BKP por konstruo de matura socialisma socio en Popola Respubliko Bulgario.

D E K L A R O

de la Centra Komitato de BEA

En „Israela Esperantisto“ aperis artikolo de prof. d-ro Ivo Lapenna, titolita „Letero al israelaj esperantistoj“. En ĝi la eksprezidanto de UEA parolas pri „senbridaj atakoj de BEA kontraŭ Israelon“ bazinte sin sur iu „valida, ampleksa, oficiala, nova programo de tiu „neŭtrala“ landa asocio“ (BEA). Laŭ la aŭtoro iu „lojala bulgara esperantisto sendis ĝin al li *post* Hamburgo“.

Lige kun tiu artikolo kaj la aktuala konduto de la eksprezidanto de UEA la estraro de BEA

deklaras:

1. En sia praktika agado BEA gvidas sin laŭ la postuloj de la statuto kaj la rezolucioj de la kongresoj kaj plenkunsidoj de sia CK. Tiuj dokumentoj plene sufiĉas por ĝia normala evoluo. Pro tio BEA ne havas ian apartan programon.

La aserto de Lapenna pri iu nekonnata al li *antaŭ* Hamburgo „oficiala programo“ de BEA estas destinita por neinformitaj esperantistoj. Tiun „programon“, kiun liveris al li „iu lojala bulgara esperantisto“ *post* Hamburgo, estas simple la *kutima estrarraporto* de BEA *antaŭ* la 38-a landa esperantista kongreso en julio 1972. . .

CK de BEA tuj *post* tiu kongreso liveris al la oficiala reprezentanto de UEA la tekston de la estrarraporto kaj la aprobitan kongresrezolucion, publikitan ankaŭ en n-ro 9/1972 de „Bulgara Esperantisto“. (Kopioj de tiuj dokumentoj estis disponigitaj ankaŭ al la dek eksterlandaj delegitaroj, ĉeestintaj la kongreson).

Nature, oni demandas sin: kial Lapenna ne komentis siatempe tiujn do-

kumentojn de BEA, se li ne aprobis ilian enhavon? Kial apenaŭ nun (kun trijara malfruigo!) kaj nome *post* Hamburgo li okupiĝis per citado de nia estrarraporto, prezentante ĝin intence kiel iun „novan oficialan programon de BEA“?

Lapenna bonege scias, ke li ne rajtas enmiksiĝi en la agadon de BEA *ekster* UEA, pro tio li elektis por siaj celoj malrektan vojon: kritikante BEA kiel kontraŭulon de la agresema politiko de Israelo rilate arabajn landojn, prezentante tion kiel pekon kontraŭ la neŭtraleco de UEA, li fakte atakas la novan Estraron de UEA en forlaso de la neŭtraleco (laŭ la formala logiko: kiu toleras BEA en la kadro de UEA, mem forlasas la neŭtralecon. . .).

Ĉiu serioza esperantisto povus direkti al li la demandojn:

„Kial vi, s-ro Lapenna, estis konsenta kun la partopreno de BEA en la agado de UEA kaj eĉ multfoje laŭdis ĝin (en Madrido, Hago, Londono, en revuo „Esperanto“ kaj aliloke), konante bonege ties statuton kaj rezoluciojn, publikigitajn en „Bulgara Esperantisto“? Kial dum vi gvidis UEA la partopreno de BEA estis tolerebla, kaj nur *post* Hamburgo ĝi estiĝis danĝera por la neŭtraleco de UEA? Se la komitatanoj A de BEA agis kontraŭ la neŭtralecon de UEA en la komitatkunsidoj aŭ en diversaj kongresorganoj, kial vi — la tiam prezidanto de UEA — ne reagis tuj? Ĉu ne pro tio, ke la bulgaraj komitatanoj ĝis Hamburgo *balotis por* vi, sed en Hamburgo ne solidariĝis kun via nekonstruktiva pozicio?“

Nun estas okulvide por ĉiuj, ke Lapenna transiris de parolminacoj pri



malintegriĝo de UEA al organizita ofensivo kaj malkaŝa malintegriĝo de UEA — tiu plej reprezenta internacia esperantista organizaĵo.

Pruvo pri tiu danĝera politiko estas la organizata kun la aprobo kaj beno de Lapenna (por ne diri ion plian) t. n. „konferenco de la neŭtrala Esperanto-movado“ en Saarlando en proksima aŭgusto. Oni bonege scias, ke se Lapenna dirus „ne“ al tiu splitiga aranĝo, ĝi simple ne okazos. Sed oni ne povas atendi de Lapenna similan paŝon. Li estas preta fari ĉion eblan por la malfortigo de UEA preparante la starigon de paralela kaj tute superflua rivala internacia organizaĵo.

2. Pro pure taktikaj neprincipaj konsideroj Lapenna faras komplimentojn al la Israela Ligo Esperantista (ILE) nomante ĝin „demokrata kaj neŭtrala“. Oni povus nur miri, kiel specialisto pri internacia juro povas fari tiun kvalifikon, sciante bonege, ke la estraro de ILE subtenas la agreseman kaj rasistan politikon de la israelaj ekstremistoj, politiko, kiu estis malaprobata de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj! Ĉu tiu pozicio de ILE korespondas kun la Deklaracio de Homaj Rajtoj de UNO, kiu fariĝis integra parto de la politiko kaj Statuto de UEA (art. 4)? Por ilustriti kiel nedemokrata kaj tute malneŭtrala estas la politiko de la estraro de ILE, sufiĉas la vortoj de D-ro Zamenhof el lia fama „Letero al la diplomatoj“: „Ĉiu regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturiĝintaj loĝantoj kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas.“ Zamenhof antaŭ sesdek jaroj protestis kontraŭ agoj, similaj al la okupado de

arabaj teritorioj fare de milittrupoj de Israelo. Kiel aktuale sonas lia protesto nun! Lapenna diras nenion novan al ILE citante nian kongresraporton rilate la agreson de Israelo, ĉar nia pozicio estas delonge konata al ILE: reprezentantoj de tiu organizaĵo regule ĉeestis publikajn kunvenojn en Rotterdamo, Madrido, Helsinki, Vieno, Londono ktp. kaj konas bonege niajn starpunktojn. En tiuj kunvenoj ĉeestis ankaŭ respondecaj personoj el la Estraro de UEA.

3. BEA apelacias al ĉiuj esperantistoj, sendiference de iliaj partipolitikaj, religiaj, organizaj, filozofiaj kaj ideologiaj konceptoj, kontraŭstari firme al ĉiuj tendencoj kaj provoj de kiu ajn persono, grupo, societo, faka aŭ landa asocio iniciati splitigon kaj komploton kontraŭ la unueco de UEA eĉ sub la populara preteksta slogano pri neŭtraleco, ĉar fakte la neŭtraleco restas gvidlinio de UEA. Ni ne permesu al pseŭdo-neŭtraluloj trompi nin!

La splitigo de UEA, eĉ nur formala, grave kompromitos la organizitan internacian Esperanto-movadon antaŭ aŭtoritataj ŝtataj kaj interŝtataj organoj kaj organizaĵoj!

Ni apelacias al ĉiuj diverstendencaj esperantistoj daŭre sidi ĉirkaŭ unu tablo kaj per komunaj klopodoj serĉi taŭgajn rimedojn por progresigi Esperanton en la tuta mondo. Tio estas tute ebla en neŭtrala, senpartia, demokrata UEA, kie oni povas fruktdone diskuti pri la *komunaj* celoj kaj taskoj de la tutmonda esperantistaro, sen ia ajn altrudo de opinioj kaj starpunktoj.

Vivu la unueco de UEA surbaze de ĝia statuto!

Sofio, en junio 1975 CK de BEA

Ivan Vazov estas amata kaj tutpopole estimata bulgara verkisto kun precipe progresema romantiko, arda patrioto, senlaca heroldo de la amikeco inter nia popolo kaj la rusa popolo-liberiginto, entuziasma poeto de la laboro, kulturo kaj progreso, majstro de la bulgara lingvo kaj parolo, kulturo kaj progreso, majstro de la bulgara lingvo kaj parolo, fiero de la bulgara literaturo, nia nacia gloro.

ONDO DE ESPERANTISTAJ ARANĜOJ

Dum la unua duono de la kuranta jaro la esperantistoj en nia lando montris notin dan iniciate non kaj aktivecon rilate al organizado de interdistriktaj kaj tutlandaj renkontigoj, celebroy de rondaj datrevenoj de la fondiĝo de E-societoj, festoj k.s. Ĝis nun tiaj okazis en Kubrat, Ruse, Ŝumen, Samokov, Ĉirpan, Karlovo, Razgrad, Trojan (Beklemeto). Tiamaniere estis engaĝitaj la esperantistoj el ĉiuj partoj de la lando. Pri kelkaj el tiuj aranĝoj ni jam donis informojn en la aperintaj numeroj de „Bulgara Esperantisto“. Ĉi-sube ni informas plue

50-JARIĜO DE „MONDAMIKECO“ — ĈIRPAN

Je la 18 de majo E-Societo „Mondamikeco“ en u. Ĉirpan celebris sian 50-jaran jubileon. Por bone prepari la celebren oni fondis iniciativan komitaton el reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj soci-politikaj organizaĵoj en la urbo. La Urba Popola Soveto helpis materiale la iniciativon. Afiŝoj kaj invitiloj estis senditaj al ĉiuj E-societoj kaj distriktaj komitatoj en la lando.

La antaŭvesperon de la celebroy la membroj de la societo kaj la gastoj prezentis florkronojn antaŭ la memorplatojn de la geesperantistoj, pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo: Klara Eŝkenazi—Iskra, Viĉo Pavlov, Isak kaj Jak Albalah.

La matenon de la 18-a estis malfermita filatelala E-ekspozicio. Inaŭguran paroladon faris Ivan Ĉakârov — estro de la urba fako por arto kaj kulturo. La ekspozicio restis malfermita por la publiko dum 10 tagoj.

La jubilea celebroy okazis en la salono de kino „Ivan Dimov“. La scenejo estis riĉe ornamita per floroj. De la muro saĝe kaj amike rigardis la portreto de d-ro L. L. Zamenhof. En la prezidantaro sidis eminentaj personoj de la urbo: Penjo Ĵelev — unua sekretario de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio, Geno Kolev — sekretario de UK de BKP, Nikola Vasilev — vicprezidanto de la Urba Soveto, Enjo Todorov — prezidanto de la Urba Konsilantaro de la Bulgaraj Sindikatoj. Ivanka Koleva — el UK de la Komsomolo, la estraranoj de CK de BEA inĝ. B. Leonov kaj Krâstju Karucin, estraranoj de „Mondamikeco“ k. a.

La celebren inaŭguris Dimitâr Tomov — prezidanto de UK de Patrolanda Fronto. Raporton pri la pasinteco kaj nuntempa agado de „Mondamikeco“ faris Dimitâr Bunarĝiev — ĝia aktivulo kaj eksprezidanto. Parolante pri la glora historio de la societo, li notis la fakton, ke 11 el ĝiaj membroj, junkomunistoj, pereis en la kontraŭfaŝisma batalo kiel partizanoj. Hodiaŭ iliaj posteuloj-esperantistoj sindone partoprenas la konstruadon de la nova

vivo en nia patrolando kaj aktive laboras per Esperanto por amikeco kaj kompreniĝo inter la popoloj, por paco en la mondo. Per sia agado ili inde respondas al la nomo de sia societo.

Post la raporto inĝ. Boĵidar Leonov dekoris per la ora insigno de BEA la brustojn de k-doj Penjo Ĵelev, Geno Kolev, Dimitâr Tomov, Ĵelju Najdenov kaj Binjo Dimitrov pro ilia ĉiama helpo al la E-movado. Per oraj, arĝentaj kaj bronzaĵoj insignoj de BEA li dekoris ankaŭ niajn E-aktivulojn Petâr Šoparov, Ivan Peev, Petâr Vâlkanov, Taŝko Georgiev, inĝ. Petko Denev, Georgi Ĥristov, Petâr Pavlov, Nevenka Vâlkanova kaj Dimitâr Bunarĝiev.

En la nomo de la societo estis premiitaj per libroj kaj E-insignoj 22 societaj membroj.

La solenaĵo finiĝis per riĉa artprogramo en Esperanto kaj bulgara lingvo. Ĝin partoprenis lernantoj-esperantistoj el v. Enina sub la gvido de sia instruistino Neli Cankova—eksa E-kursgvidantino en Ĉirpan, amatoraj artotrupoj de popola legejo „P. K. Javorov“, Georgi. Nejkov k. a.

Posttagmeze la gastoj vizitis la muzeon de nia granda poeto „P. K. Javorov“ kaj la muzeon de la revolucia movado.

Ivan Peev

Esperanto-ekspozicio de infanpentraĵoj

La Esperanto-societo en Sante Colome de Gramanet — Hispanio, aranĝis en julio ekspozicion de infan-pentraĵoj por demonstri la internaciecon de Esperanto.

Multaj Esperantistaj-societoj de Bulgario sendis ĉirkaŭ 250 pentraĵojn. Speciala komisiono elektis kaj sendis al Hispanio la plej konvenajn.

Modestajn premiojn de CK de BEA ricevis infanoj el la urboj: Bjala, Velingrad, Sofia, Ĉirpan, Bansko, Pomorie, Sviŝtov, Plovdiv, Lâki, Dimitrovgrad, Blagoevgrad, Kneĵa, Mâglij kaj de la vilaĝoj Zimnica kaj Krepost.



La 15-an de junio en v. Dālboki, distrikto de Stara Zagōra, oni celebris la 50-jariĝon de la E-movado en la vilaĝo. Samtempe oni celebris ankaŭ la 80-jaran veteranon de Esperanto en la vilaĝo Bojĉo Damjanov — ĝia multjara prezidanto kaj kursgvidanto, elstara kontraŭfaŝisma batalanto.

Ĉeestis multaj esperantistoj el Stara Zagora, Ĉirpan, Kazanlāk, Gālābovo, Māglij k. a.

Raporton faris Rajno Ĉipilev — prezidanto de DK de BEA en Stara Zagora. Reprezentantoj de ĉiuj ĉeestantaj grupoj gratulis la societon-jubileulon.

La programon partoprenis junaj esperantistoj lernantoj el u. Stara Zagora kaj la vilaĝoj Dālboki kaj Kolarovo, gvidataj de siaj E-geinstruistoj Jana Terzieva, Roza Dimitrova, Jordan Ĉervenkov. Partoprenis la programon ankaŭ la eksa operartistino Rene Jordanova, laŭreato de Dimitrov-premio, kiu deklamis en Esperanto.

Ĉiuj partoprenantoj en la solenaĵo vrzitis la lokan muzeon. Iuj ekskursis al la monto — ĝis montodomo „Komsomolska Poljana“.

R. Ivanov

E-RENKONTIĜO EN RAZGRAD

E-Societo „D-ro L. L. Zamenhof“ iniciatis E-renkontiĝon dediĉe al la Internacia Jaro de la Virino. Ĝi okazis je la 7—8 de junio. Partoprenis ĉ. 60 esperantistoj el la distriktoj de Ruse, Varna, Razgrad.

La renkontiĝo estis inaŭgurita en salono de la Domo de Politika Klerigo. Bonvenigis la gastojn Dimo Dimov — prezidanto de la societo. Salutojn prezentis: Kunĉo Vālev — sekretario de CK de BEA, doc. Georgi Dimov — prezidanto de DK de BEA en Varna, Boris Kavalĝiev — E-veterano el Ruse. En la nomo de la Patrolanda Fronto kaj la Konsilantaro de la Virinoj en Razgrad salutis Cenka Bahneva, kiu esprimis tre favoran rilaton al Esperanto kaj altan pritakson de la agado de la esperantistoj.

Raporton lige kun la Virinjaro legis Rajna Arnaudova el Sofio.

Fortan impreson al la ĉeestantoj faris la alparolo de s-ano Hin Hok Srin el Kamboĝo, kiu ĵus finis siajn studojn pri kemio en Budapeŝto. La juna samideano, veninta speciale por la E-renkontiĝo laŭ invito de sia amiko el Razgrad, esprimis admiron kaj amon al socialisma Bulgario kaj kredon, ke la rilatoj inter la bulgara kaj kamboĝana popoloj fariĝos ciam pli intimaj kaj rezultodonaj.

Post la oficiala kunveno sekvis kamaradeca vespermanĝo kaj amuzado en restoracio „Abritus“.

Je la 8-a matene antaŭ la esperantistoj estis projekciita la kolora soveta filmo „La lando,

kiun mi amas“ kun parolo en Esperanto. Poste ili vizitis la historian muzeon kaj la murrestaĵojn de la antikva urbo Abritus.

La gastoj disveturis. Restis nur s-no Srin. Dum tri tagoj li sukcesis viziti la Konservan Kombinumon, la Pan-Uzinon, la entreprenon „Serdika“ (por laktoprilaborado), la Vitrouzinon k.a. Li vizitis ankaŭ infangardenon n-ro 5 kaj lernejon „V. Levski“. Ĉie li faris grandan propagandon pri Esperanto. S-no Srin deklaris, ke li vizitis, 18 landojn, kaj plej fortan impreson faris al li la socialismaj landoj. El Razgrad li forveturis al Sofio por gastigi al la ĉefurbaj esperantistoj.

Vārban Hristov

E-RENKONTIĜO SUR LA MONTARO

En Bekleme, proksime de Trojan, je 1300 m super la marnivelo, okazis la Tria Distrikta Esperantista Renkontiĝo-Recitalo, dediĉita al la XI kongreso de BKP kaj la Internacia Jaro de la Virino. Ĉeestis pli ol 40 samideanoj. Priokazan raporton faris Coĉo Kolarov — prezidanto de DK de BEA en Loveĉ.

La recitalo konsistis el E-kantoj kaj poezio dediĉitaj al la virino kaj la batalo por internacia amikeco kaj paco. Bone prezentigis: Sābka Minkova, lernantino el Loveĉ, la kantgrupo de la Ekonomia Teknikumo — Loveĉ, la ĝelernanta E-Rondo en la gimnazio „V. Levski“ — Trojan.

Estis disdonitaj la atestiloj kaj premioj al la kursanoj el la Ekonomia Teknikumo — Loveĉ, kiuj sukcese finis E-kurson por komencantoj sub la gvido de Peĉo Vlaĥov.

Ilija Ivanov

GRAVAJ SUKCESOJ DE ESPERANTO INTER LA JURISTOJ EN SOFIO

La printempaj E-kursoj, organizitaj de E-Societo „Justeco“ ĉe la Bulgara Asocio de Juristoj, finiĝis tre bone: el 102 gekursanoj, dividitaj en 4 grupoj (3 elementaj kaj 1 por progresintoj), sukcese finis 80 personoj, kiuj ricevis atestilojn.

Lige kun la finiĝo de la kursoj estis organizita solena Esperanto-vespero de la kursanoj. Ĉeestis preskaŭ ĉiuj kursanoj kaj kursgvidantoj, ankaŭ la prezidanto de BEA N. Aleksiev, la prezidanto de DK de BEA en Sofio Georgi Dolapĉiev, la E-veteranoj Atanas D. Atanasov, Simeon M. Simeonov k. a.

La vesperon malfermis la prezidanto de „Justeco“ Ĝenĉo Ĝenĉev, kiu pritraktis koncize la laboron de la kursoj. Li kore dankis al la kursgvidantoj K. Vālev, S. Hesapĉiev L. Marikin, M. Bācev kaj la konsultanto P. Taŝkov pro ilia sindona laboro. Ili ne nur instruis la lingvon, sed ankaŭ edukis la kursanojn esti fervoraj kaj fidelaj esperantistoj.

Al la kursanoj oni disdonis donace E-libroin kaj insignojn. Ili prezentis belartan programon.

G. Ĝenĉev

Estas interese scii ĉu ekzistas ie en la mondo simila festo—festo de la Rozoj. Sed ĉe ni ĝi ekzistas: ĉiujare la unuan dimanĉon de junio. Kaj ĉiam diversloke en la ĉarma Roza Valo, ŝirmita de du montoj — Balkano kaj Sredna Gora. Jam kelkajn jarcentojn ĉi tie oni kulturas la rozarbuston kaj el ĝia floraĵo produktas la faman bulgaran rozoleon.

Sed la festo estas tute nova — apenaŭ dek-jara. Festo de socialisma Bulgario. Ni, la esperantistoj, estas aparte fieraj, ĉar ĝin iniciatis niaj samideanoj. Antaŭ deko da jaroj la Festo okazis unuafoje en vilaĝo Rozino sub la iniciato de la loka esperantisto Georgi Arnaudov, forstisto.

Ĉi-jare por tria fojo ĉefurbo de la festo estis Karlovo. Invitite de la loka E-Societo „Vasil Levski“ ĉi tie kolektiĝis cento da esperantistoj el la tuta lando. Iia aktiveco okupis la sabatan vesperon, je la 30-a de majo. En la salono de la Kulturdomo ili ĝuis la arton de Bjalka Beleva, Anani Anev, Miĥail Ĉobanov kaj Olga Popova, artistoj el la Bulgara E-Teatro. La trupo prezentis la komedion „La ruĝaj rozoj“ de Aldo de Benedeti. La saman spektaklon ĝi prezentis pasintjare enkadre de la IFEF-kongreso en Taragono, Hispanio. Tiam — esperantlingve, nun bulgarlingve. La konsidero praviĝis: la salonon plenigis, krom la esperantistoj, kelkcenta neesperantista publiko. Ĉiuj admiris la altnivelan ludon de la artistoj kaj tondre ilin aplaŭdis.

Post la spektaklo — vespermanĝo kaj amika kunesto en restoracio „Moskvo“. Oni kantis, partoprenis tombolon, en kiu ĉiu gajnis, ktp.

Matene, la 1-an de junio, dudekmila publiko el ĉiuj regionoj de la patrolando kolektiĝis sur la stadiono. Aperis ankaŭ multaj eksterlandanoj. La feston honoris per sia ĉeesto la mi-

nistro-prezidanto de PR Bulgario k-do Stanko Todorov.

La 10-a horo. Tempo por inaŭguro. Streĉita atendo. Jam ne plu estas lokoj, sed novaj venintoj impetas eniri. . . Kaj jen komenciĝis: al la stadiono direktiĝas helikoptero kun flir-tanta nacia flago. Ĝi superflugas malalte. Post ĝi — dua aviadilo kun la ruĝa partia flago. Tria aviadilo — kun blanka flago, sur kiu vi-diĝas la emblemo de la festo. Sed kial la kvara aviadilo nenion portas? Ĝi proksimiĝas, venas ĝuste super la publiko kaj — kia surprizo! — pluvo da rozoleo! Trifoje la aviadilo ĉirkaŭis kaj trifoje la homoj estis aspergitaj de rozoleaj gutetoj. Parfumo plenigis la aeron, ĝoje-go plenigis la korojn en tiu sunbrila junia mateno.

Ankoraŭ ne trankviliĝis la emocioj — jen sur la stadiono aperas kun fortega diverssona tintado la famaj „kukeroj“¹, post ili enfluas homkolonoj bunte vestitaj en naciaj kostumoj kaj fine — milo da junpioniroj kaj komsomolanoj. Ĉiuj viciĝas sur la stadiono, plenigante la tutan spacon. Koncizan paroladon pri la rozkulturado en la regiono kaj pri ĝiaj perspektivoj faris Dimităr Karamukov — prezidanto de la Distrikta Popola Soveto. Kaj la homvicoj sur la stadiono ekmoviĝis. Sekvis preskaŭ duhora programo — parado de gracieco kaj multkolorco, esprimado de estimo al la laboro de la rozkulturantoj, glorigo de nia libera patrolando, firme paŝanta sur la vojo de paco kaj socialismo.

K. Vălev

¹ „Kukeroj“ — laŭ malnova popola kutimo, ligita kun la agrikulturo kaj brutbredado, junuloj maskitaj, vestitaj en strangaj buntaj kostumoj kun multaj diversgrandecaj sonoriloj ĉe la zono; ili marŝas surstrate forte tintigante la sonorilojn. Cio ĉi estas tro amuza por la publiko.

ESPERANTISTOJ-SCIENCISTOJ EI BRITLANDO ĈE NI

En majo gastis en nia lando sinjoroj Richard Osborne kaj Piter Forster, ambaŭ el Britlando.

S-ro Osborne, profesoro de ekonomia geografio en la universitato de Nottingham, estis oficiala gasto de la Komitato por Scienco, Tekniko kaj Supera Klereco. Paralele kun siaj renkontiĝoj, lekcioj, interparoloj kun reprezentantoj de diversaj rondoj en nia lando li havis eblecon renkontiĝi ankaŭ kun bulgaraj esperantistoj.

La 15-an de majo prof. Osborne estis gasto de E-societo „Maksim Gorkij“ en Sofio. Interesan lecion li faris pri la problemoj de la ekonomia geografio, lige kun la konservo de la atmosfero kaj la ĉirkaŭa hommedio puraj, pri la urbanigo, pri la migrado de la laborforto el la vilaĝoj al la urboj.

S-ro Forster, juna sciencisto sociologo el la universitato de Null, gastis (tute aparte de prof. Osborne) al la sofiaj E-Societoj „M. Gorkij“ kaj „Vela Peeva“, al la E-Societo „Vekiĝo“ en Ŝumen k. a. La renkontiĝo kun la sofiaj studentoj-esperantistoj, kiu okazis en la Sofia Universitato, partoprenis ankaŭ niaj samideanoj Vasil Ĉoĉov — profesoro de filozofio en la Supera Ekonomia Instituto „Karl Marks“, kaj Kunĉo Valev — sekretario de CK de BEA kaj lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato. S-ano Forster, kiu nun laboras super scienca verko pri la sociologiaj problemoj de la Esperanto-movado, estis detale informita pri la junulara kaj studenta E-movadoj en nia lando fare de kamaradoj V. Ĉoĉov, K. Kălev, Stojan Mâtĥarov kaj Georgi Miĥalkov — pre-



zidanto de E-Societo „Vela Peeva“.

S-ro Forster turnas sin al la bulgaraj esperantistoj kun lapeto, ke ili sendu al li konci-
zajn respondojn al la jenaj tri demandoj:

1. Kiam kaj kiel vi decidis lerni Esperan-
ton?
2. Kiel vi uzas praktike Esperanton?
3. Ĉu laŭ vi Esperanto similas alian ideolo-
gion?

Bonvolu respondi klare, indikante ankaŭ
vian aĝon, sekson, profesion kaj instruitecon.
La respondojn sendu al la redakcio de „Bulga-
ra Esperantisto“.

Lasto Nikov



EKSTERLANDAJ GASTOJ EN ŜUMEN

R. Osborne

Lige kun la 70-jara jubileo de la E-Societo
„Vekiĝo“ en Ŝumen al la esperantistoj en la
distrikto gastis samideanoj Manfred kaj Klaus
Dunirt el la ĝemela urbo Magdeburg (GDR)
kaj P. Forster el Britlando.

La 16-an de majo la tri gastoj, akompani-
taj de la prezidanto de BEA N. Aleksiev kaj
la prezidanto de DK de BEA en Ŝumen Ata-
nas Bojaĝiev, renkontiĝis kun la esperantistoj
en la uzino por remorkoj en u. Preslav. Ĝe-
kamaradoj inĝ. Stilijan Stilijanov, Rajna Stan-
ĉeva kaj d-ro Georgi Popov konigis al la
gastoj la staton de la E-movado en la uzino
kaj la urbo, la ligojn de la esperantistoj kun
la aliaj soci-politikaj kaj kulturaj organizaĵoj,
la produktaĵon de la uzino ktp.

Poste la gastoj konatiĝis kun la historiaj
kaj naturaj rimarkindaĵoj de Preslav, vizitis
ankaŭ Pliska kaj Madara.

Rajna Stanĉeva



P. Forster

Ĥoro „Nigra Maro“ kantas

Jam trian jaron vivas kaj disponigas al la
publiko — esperantista kaj neesperantista —
la fruktojn de sia altnivela arto la kanthoro ĉe
E-Societo „Nigra Maro“ — Burgas.

La 5-an de junio la ĥoro sub la direktado
de Stefan Lalĉev faris koncerton antaŭ sovetaj
turistoj, ripozantaj en „Slânĉev Brjag“. En la
programo estis kantoj en Esperanto, rusa kaj
bulgara lingvoj. La publiko entuziasme aplau-
dis la plenumantojn. La koncerto pasis sub la
signo de la vivodona bulgara-soveta amikeco,
de kunlaborado kaj kompreniĝo inter ĉiuj po-
poloj kaj paco sur la tero.

La sovetaj gastoj dankis sincere kaj prezen-
tis memordonacojn al la kanthoro.

Maria Boneva

HUMURAĴOJ

Kostumo

Du viroj interparolas:

— Mia edzino estas tre ŝparema virino.
Imagu, el sia balkostumo ŝi farigis por mi
kravaton.

— Neniaĵo! Mia edzino farigis por si
balkostumon el mia kravato.

Logike

En la psikiatria hospitalo kelkaj flegatoj
kartludas kaj unu flegato pendas super ili
sur la lustro. Venas flegisto kaj demandas:

— Kial tiu pendas sur la lustron?

— Li pensas, ke li estas elektra lampo kaj
lumigas por ni.

— Sed kial vi ne deprenas lin de tie?

— Ĝar ni ne volas kartludi en mallumo.

ONI NOMIS LIN „KOJUH“

Dokumenta rakonto de ĤRIMA

La deĵoranta gardisto malfermis la pordon kaj ĵetis pakaĵon antaŭ la piedojn de la malliberulo Kosta Atanasov — korpulenta junulo kun nigraj okuloj kaj tonditaj lipharoj, samkoloraj.

— Pretigu vin por civila vivo! — avertis la gardisto.

Kosta ĝojkriis, metis la pakaĵon sur la matracon kaj disvolvis ĝin: kaskedo, ĉemizo, jako, pantalono. Ĉio ĉi estis ege ĉifita.

Post unu horo la malliberulo eliris el la kudrejo kun gladita kostumo, eniris la kabineton de la ĉefgardisto kaj kun kaskedo en mano haltis antaŭ lia skribotablo. Vidinte lin, la sinjoro en nigra uniformo flankenlasis la cenzuratajn leterojn, metis antaŭ sin la dosieron de la juna viro kaj kroĉis sian esplorrigardon en la rigardon de la enirinto.

— Ĉu vi estas Kosta Atanasov? — demandis la ĉefgardisto.

— Ĝuste mi! — respondis laŭ soldata maniero la malliberulo.

La uniformulo foliumis la dosieron kaj voĉlegis el la verdikto: „La juĝato Kosta Atanasov, simpatianto de la eksterleĝa Komunista Partio, disvastigis en la kazerno proklamon, kiu entenis la devizon: „Vivu la bulgara antifaŝista armeo!“

Kosta manĉifis sian kaskedon kaj balbutis, ke ne memoras ĝuste la enhavon de la proklamo.

La ĉefgardisto avertis lin kun severa tono:

— Vi rericevas vian liberecon, Atanasov. Estu prudenta. Foje vi evitis la pendumilon, sed se vi faros similan krimon duan fojon, ve al vi! Venas milittempoj, kiam funkcios milittribunaloj, — li minacis rigore. — Kie vi intencas loĝi?

— En Plovdiv, kompreneble.

— Ĉu vi disponas monon por veturi ĝis tie?

— Tute ne.

— Jen dokumento por senpaga veturo.

Kosta jesis, enpoŝigis la paperon kaj petis permeson foriri.

La montrofigro de la ĉefo premis sonorbutonon. Post minuto eniris la deĵoranta gardisto.

— Akompanu lin ĝis la elirejo!

Kosta eliris el la malliberejo kaj enspiris freŝan aeron. Farinte kelkajn paŝojn laŭ la aleo, li eksentis kapturniĝon kaj eksidis sur benkon. Post ioma tempo tamen li rememoris, ke li sidas proksime de la malliberejo, kaj ektimis, ĉu oni denove ne enkarcerigos lin. Kosta ekstaris kaj ŝanceliĝante plupaŝis al la fervoja stacidomo. Apude staris la ejo de la fervoja polico, kie li devis anonci sin kaj ricevi senpagan bileton. Li tamen ne faris tion, timante, ke iu policano kondukos lin al la distrikta policejo en Plovdiv. Li do envagoniĝis sen bileto.

En la triaklasa kupeo sidis kelkaj sinjoroj. Iu okulvitrulo komentariis pri la ĵus eksplodinta milito inter Germanio kaj Pollando. Laŭ la asertoj de la

okulvitrulo, Hitler konkeros la regionojn kun germandevenaj civitanoj kaj ĉesigos la militon. Kosta opiniis, ke per sia militiro kontraŭ Pollando, Hitler ekscitas novan mondmiliton. La plimulto subtenis la opinion de la okulvitrulo, ĉar li estis pli elokventa ol Kosta.

— La proksima estonteco refutos vin! — firme deklaris Kosta.

Ĝuste nun eniris la kontrolisto kaj konstatis, ke Kosta estas vojaĝanto sen bileto. Li kolere minacis:

— Vi devas aĉeti bileton kaj pagi punmonon!

Kosta montris la ateston pri liberigo kaj aldonis:

— Mi ne havas eĉ groŝon. Ĉu vi ne konjektas, de kie mi venas?

— Vi devis vin anonci ĉe la polico.

Aŭdinte, ke la juna homo ĵus forlasis malliberejon, la kunveturantoj, laŭ propono de la okulvitrulo, kolektis la necesan monon por bileto.

— Kiom longe vi restis en la kaĝo? — scivolis la okulvitrulo.

— Sep jarojn.

— Ĉu pro politikaj kaŭzoj?

— Mi nek ŝtelis, nek iun mortigis. Mi simple deklaris, ke mi neniam partoprenos en milito kontraŭ Sovetunio.

La kunveturantoj silente aprobis lian konduton.

Reveninte Plovdivon, Kosta tre deziris viziti la klubejon de la esperantistoj. Sed tie ofte aperis reprezentanto de la polico, kiu konis kaj jam avertis lin ne plu okupiĝi pri Esperanto.

Restis la sola ebleco — legi Esperantajn gazetojn kaj librojn en la kudrejo de Ivan Bataklijev, lia malnova amiko. Ili kune lernis la lingvon, kune soldatservis. Ekstere, sur tabuleto flanke de la pordo, estis surskribo: „Ĉi tie oni parolas Esperanton“.

Iutage Ivan aludis, ke la kostumo de Kosta estas jam eluzita.

— Jes, mi bezonas novan kostumon kaj novan palton, ĉar la vintro jam

proksimiĝas.

— Mi kudros ĝin senpage, nur petu monhelpon por ŝtofo.

— Kiu oferos monon por mi? — ekmiris Kosta.

— La helporganizo, kiu sendis al vi nutraĵojn en la malliberejon.

Dum la vintro Kosta aligis al rondeto, en kiu oni studis la historion de la Komunista Partio de Sovetunio. La sama rondeto iniciatis kolektadon de subskriboj por pakto de amikeco inter Bulgario kaj Sovetunio. Tamen la reĝo kaj liaj ministroj neglektis la volon de la popolo kaj aligis nian landon al la akso Berlino — Romo — Tokio. Je la unua de marto 1941 germanaj trupoj interkonsente kun la registaro okupis nian landon. Centoj da transportaj kaj ĉasaviadiloj alteriĝis ĉirkaŭ Plovdiv. Tra la mallargaj stratoj de la urbo veturis tankoj kaj kirasaŭtoj. Sur la trotuaroj svarmis germanaj soldatoj: infanterianoj, aviadistoj, paraŝutistoj. Multaj gapis al la montrofenestroj. Iu paraŝutisto, belstatura, kun rozkoloraj vangoj tralegis la Esperantajn vortojn ĉe la pordo de la kudrejo kaj eniris ĝin. En flua lingvo li alparolis la enestantajn Ivan kaj Kosta:

— Mi estas aŭstra esperantisto.

Kosta utiligis la okazon interparoli kun fremdulo, kvankam li forte malŝatis la uniformon kun naziista emblemo. La aŭstro informis ilin „sub sekreto“, ke lia regimento flugos al insulo Kreto por forpeli de tie la anglojn. Ili interkonsentis pri nova rendevuo, sed ĝi ne okazis, ĉar la aŭstro forflugis.

Baldaŭ post tio Kosta estis mobilizita kaj forveturis al la turka landlimo.

La 22-an de junio je la deka horo lia bataliono estis alarmita. Kvincent soldatoj viciĝis sur la ekzercplaco. La batalionestro, energiplena majoro, salutis la soldatojn kaj komencis oratori pri la nevenkebla germana armeo. Li kun aplombo informis, ke la tanka;

formacioj de Hitler jam kuras tra la rusaj ebenaĵoj.

Surprizo trakuris la vicojn de la soldatoj. Ja estis pakto pri neŭtraleco inter Germanio kaj Sovetunio! La majoro finis sian patosan oratoraĵon kaj demandis:

— Kiu deziras militi kontraŭ la bolŝevista hidro? Volontuloj, tri paŝojn antaŭen!



Kun koro tremanta Kosta pensis: Ĉu inter ni troviĝos aĉuloj, kiuj dungos sin ĉe la hitleranoj?

Ekregis tomba silento. La majoro fikse rigardis al iuj en la okulojn, tamen neniu ekmovis sin. Tio kolerigis lin. Li eksplodis kaj oni aŭdis el lia buŝo arogajn insultojn kaj ofendojn. La batalionestro ordonis, ke ĉiuj restu envicigitaj je la suno ĝis tagmezo por mediti pri la propono.

Li eniris sian barakon, blasfemante la „timeman gregon“...

Pro la forta suno iu soldato falis teren. Kosta kun la apudstaranta Petro Veleŭ forlasis la vicon kaj levis la sangantan sunfrapiton. La bataliono dis-

iris, ne atentante la ordonon de la majoro.

Komence de julio Petro Veleŭ, amiko de Kosta, ricevis forpermeson. Adiaŭante kun Kosta li aludis, ke li certe ne plu revenos en la kazernon. Li flustris:

— Mi aŭdis, ke la Partio alvokas al partizanmilito. Mi nepre aliĝos. En niaj montoj ekzistas bonaj kondiĉoj por tiu celo.

— Mi sekvos vin...

— Vi ne rapidu, — konsilis Petro. — Atendu ĝis la venonta printempo.

Kaj vere, Petro Veleŭ ne revenis en la kazernon. La majoro deklaris lin „perfidulo“.

En la aŭtuno Kosta estis eksigita kiel rezervulo kaj revenis al Plovdiv. Por gajni la panon, li fariĝis briklaboristo. Malgraŭ la laciga taglaboro, li trovis tempon por saluti sian amikon Batakliĉev. La kudristo disponis interesan literaturon kaj Kosta prunteprenis iujn librojn. Vespere ĉe flagranta petrollampo li tralegis la romanon de Lev Tolstoj „Milito kaj paco“, ankaŭ la „Dek tagoj, kiuj skuis la mondon“ de John Reed (Ĝon Rid), „La fera kalkanumo“ de Jack London, „La fera torento“ de Aleksandro Serafimoviĉ. La ĉi lastan verkon Kosta tralegis du foje kaj esprimis sian admiron antaŭ Ivan:

— La ĉefheroo Koĵuh estas admirinda bolŝevisto!

Kaj dum la printempo, kiam li fariĝis partizano, li petis, ke oni donu al li la sekretan nomon „Koĵuh“.

— — — — —

La taĉmento nombris dekkvin partizanojn, kiuj suferis pro manko de nutraĵo. Koĵuh estis komisiita zorgi pri provianto. Iunokte li kaj ankoraŭ unu partizano, nomata „La doktoro“, direktis sin al renkontejo, kiu situis proksime de ŝoseo. Tie, kaŝite en arbustoj, atendis ilin sako da faruno, terpomoj kaj fromaĝo. Proksimiĝante al la loko, Kosta aŭdis ian flustradon.



— Oni embuskas nin, — avertis li, streĉante orelojn.

— Kiel rekruto vi timas la susuron de folioj, — primokis lin „La doktoro“.

Ambaŭ ili faris kelkajn paŝojn laŭ la ŝoseo. En la mallumo ili vidis ian fajron kaj tuj aŭdiĝis du-tri paŝoj. „La doktoro“ tuj ĵetis sin en la apudŝosean defluejon. Postkurante lin Kosta eksentis, ke io pinĉis lian dekstran femuron. La pantalono trempis sin en sango, la dekstra piedo ne plu obeis al li. „La doktoro“ porponis sian ŝultron kaj tiel ili iris for de la danĝera loko.

Esplorinte la vundon „La doktoro“ konstatis, ke la kuglo restis en la karno super la genuo. Post kelka tempo la vundita loko ŝvelis. Estis necesa urĝa interveno de kirurgo.

La distanco de la montaro ĝis Plovdiv estis trairebla por du-tri horoj, sed la vundito kaj lia kamarado bezonis tutan nokton por atingi la sudan periferion de la urbo, kie loĝis ilia komuna amiko esperantisto Slavĉo Kârpaĉev.

— Karulo, — alparolis lin Koĵuh, — iru tuj al kirurgo Koev kaj venigu lin.

Koev estis la plej kapabla kirurgo en la urbo, helpema al laboristoj kaj malriĉuloj. Antaŭ nelonge li operaciis la edzinon de Slavĉo.

Do, Slavĉo eniris la kabineton de Koev, salutis lin kaj flustre alparolis:

— Doktoro Koev, ĉi-foje mi ne venas pro la edzino. Ŝi bonfartas. En mia domo vin atendas partizano kun kuglo en la femuro. Lia genuo abcesas.

— Kiu vundis lin, ĉu li mem?

— Policianoj, mi supozas.

— Riska afero, Slavĉo.

— Via vizito estas tute senriska. Vi venas pro mia edzino.

— En viaj vortoj estas logiko, — respondis la kirurgo, — ni iru. Koev esploris la vundon kaj diris:

— Mi ne povas narkoti vin, kamarado.

— Do, sen narkoto. Mi mutos kiel fiŝo.

Slavĉo alportis ŝnuron. Li ŝtopis la buŝon de Koĵuh per viŝtuko kaj premis lian kapon per manplatoj. La kirurgo trempis siajn instrumentojn en bolanta akvo, kuspe faldis la manikojn kaj enkarnigis la tranĉilon. La kuglo ne kuŝis profunde sub la haŭto kaj la kirurgo lerte eligis ĝin. Post tio li lavis la vundon per fenolo kaj ordonis al Slavĉo disvolvi la ŝnuron. Admirante la kuraĝon de la vundito, Koev karesis per mano lian nigran hararon kaj laŭdis lin:

— Vi havas feran volon, kamarado.

— Dankon, sinjoro kirurgo. Mi neniam forgesos vian komplezon.

Post kiam la vundo cikatriĝis, Koĵuh, apogante sin sur lambastono, revenis al la montaro.

La glora venko ĉe Stalingrad edifis dekojn da plovdivaj antifaŝistoj, kiuj aliĝis al la partizanaj taĉmentoj en Rodopi-montaro.

Koĵuh jam komandis la taĉmenton je la nomo de la mortpafita komunisto-heroo Petro Ĉengelov.

Je la 26-a de junio en la bivakon de la taĉmento venis korpulenta viro, kvardekjara. El sub lia kaskedo pendis grizaj bukloj, el sub la kamizolo mortriĝis peza pistolo. La kuriero, kiu akompanis la nekonaton, alkuris kaj raportis al Koĵuh:

— La distrikta komandanto!

Koĵuh ordonis viciĝon de la partizanoj kaj anoncis:

— Atenton! Renkonte al la komandanto de nia militzono!

Forte laŭkutime li manglatis sian kamizolon kaj turnis sin al la gasto:

— Kamardo komandanto, mi prezentas al vi la taĉmenton „Ĉengelov“!

La komandanto faris kelkajn paŝojn antaŭ la viciĝintaj partizanoj kaj sekvis per okuloj ĉiun vizaĝon. En si li ĝojis, vidante tiom multe da gejunuloj, pretaj batali kontraŭ la faŝistoj. Kun fe-

liĉa mieno li levis pugne la maldekstran manon kaj salutis:

— For la faŝismon!

— Vivu la libero! — unuvoĉe respondis la partizanoj.

La komandanto intencis resti en la bivako kelkajn tagojn. Tuj post sia alveno li petis la taĉmentestron rakonti, kia estas la animstato de la batalantoj, kiajn kontaktojn havas la taĉmento kun la antifaŝistoj en la proksimaj vilaĝoj, kiel oni havigas provianton. Poste li parolis pri la sama temo kun ĉiuj partizanoj.

Vespere la gardostarantoj venigis en la bivakon ĉifonvestitan vilaĝanon. Koĵuh kaj la komandanto esplordemandis lin. Tremante pro timo la vilaĝano rakontis, kie li loĝas, kiel li eniris la arbaron por serĉi sian perditan mulon kaj kiel tute hazarde li trafis la gardantojn. Li petis liberigon, ĵure promesante nenion informi pri la bivako.

— Ni laŭdas vin pri tio, — trankviligis lin Koĵuh kaj petis la kuiriston prepari por li vespermanĝon.

Ĉirkaŭ noktomezo la vilaĝano estis liberigita.

Sed ne fidante entute al li, Koĵuh kaj la komandanto decidis, ke la taĉmento forlasu provizore la bivakon. Kiel bona konanto de la ĉirkaŭaĵo, „La doktoro“ estis devigita serĉi alian bivakon. La tutan nokton li kondukis la taĉmenton tra arbaroj kaj preter abismoj. Kiam tagiĝis, Koĵuh kun teruro konstatis, ke ili estas revenintaj la saman lokon. Ĉar estis danĝere piediri tra la arbaroj kaj valoj dum hela tago, la partizana stabo decidis, ke la taĉmento restu en la sama bivako.

La tago pasis en ekscita atendo de danĝero. Koĵuh ofte iris al la gardostarantoj por kontroli, ĉu malamiko ne minacas ilin. Tamen nenio eventis dum tiu tago.

Sekvis ankoraŭ du trankvilaj tagnoktoj. Kosta kaj la komandanto jam

kredis, ke la vilaĝano estas homo honesta. Ili decidis resti ankoraŭ kelkajn tagojn en la bivako.

La nokto antaŭ la trideka de junio estis stelplena kaj agrable varmeta. En la arbokronoj melodiis najtingaloj. Ĉe la proksima fonteno kapreoloj bleksereĉis unu la alian. Koĵuh kuŝis apud la komandanto kaj ĝuis la trilojn de la birdoj. Sed subite la arbaro eksilentis. La deĵoranto proksimiĝis al la kuŝanta taĉmentestro, klinis sin al li kaj flustris:

— Kamarado Koĵuh, ni estas denunciataj. Venas al ni policianoj.

Koĵuh saltleviĝis, rapidis al la observejo kaj streĉis okulojn en la matenkrepusko. Inter la maldensaj arbotrunkoj li rimarkis la figuron de la vilaĝano, kiu serĉis la bivakon. Kosta revenis al sia kuŝloko kaj vekis la komandanton:

— Kamarado Todorov, ni vane fidis la vilaĝanon. Li denunciis nin. Mi alarmos la taĉmenton.

— Jes, tuj!

Dum la vekigintaj partizanoj demandis unu la alian, pro kio estas la alarmo, Koĵuh komandis:

— Unua batalgrupo, okupu pozicion dekstre de mi. Dua batalgrupo — maldekstre!

La partizanoj en kuŝa pozicio direktis armilojn al la singardeme proksimiĝanta malamiko.

Ĉe tagiĝo la batalo ekflamis. Klinate sin, Koĵuh kuris de grupo al grupo kaj kuraĝigis la batalantojn. Li avertis ĉiujn ŝpari la municion.

Post duhora interpafado, dum kiu kelkaj policianoj plorgemis pro ricevitaj vundoj, Koĵuh kriis atakon kaj ekstaris por gvidi la taĉmenton al la proksima altaĵo, de kie la partizanoj povos forlasi la sieĝitan bivakon. Tamen li ne sukcesis atingi la celon — malamika kuglo trafis lin. Li falis teren kaj palpis sian ventron. Ĝi sangis.

Komprenante sian senesperan staton, li turnis sin al la partizanoj kaj diris:



— Kamaradoj! Daŭrigu la batalon! La morto ne estas tiom terura, kiam temas pri la libero! — Li trovis per okuloj la komandanton kaj daŭrigis: — Kamarado Todorov, mi mortas. Mi konfidas al vi la taĉmenton!

Dirante tion, Koĵuh direktis la pistolon al sia brusto kaj premis la ĉanon. Unusola pafo — kaj venis la morto...

La pereco de la taĉmentestro ne mal-kuraĝigis la partizanojn malgraŭ la furiozaj atakoj de la faŝistoj. Bomboj elradikis arbustojn, maŝinpafiloj sputis kuglojn.

Dum mallonga interrompo de la batalo la komandanto avertis:

— Ŝparu la kartoĉojn, kamaradoj! Celu nur al policanoj! Sekvu min!

Li ekstaris por realigi tion, kion ne sukcesis fari Koĵuh. Lian figuron rimarkis la policestro kaj direktis al li sian aŭtomatan pafilon. La komandanto

genuis, bruste vundita. Novaj kugloj trafis lian kapon. La morto tuj venis. La batalo daŭris dum la tuta tago...

— — — — —

Nun apud la bataalkampo staras ŝtona kolono, sur kiu estas ĉizitaj la nomoj de la pereintaj kontraŭfaŝistoj:

Komandanto Georgi Jeĉev — Todorov — 39-jara

Taĉmentestro Kosta Atanasov — Koĵuh — 32-jara

Partizanoj:

Suzi Geron — Vera, 22-jara

Stojan Ŝiŝkov — Spartak, 20-jara

Nikola Kostadinov — Petko, 32-jara

Albert Benvenisti — La dektoro, 29-jara

Hristo Hristov — Petjo, 20-jara

Ofte preterpasantaj turistoj metas ĉe la ŝtonkolonon bukedojn de monto-floroj.

125 jaroj ekde la naskiĝo de Iv.Vazov

GRANDA BULGARA VERKISTO

En la mondliteraturo estas malmultaj verkistoj tiel multampleksaj, tiel meritplenaj por la literatura kaj ĝenerala evoluo de sia popolo kiel Ivan Vazov.

Per liaj verkoj la bulgara literaturo ricevis altan svingon. Kiam ili aperis, multaj literaturaj branĉoj ankoraŭ atendis sian majstron. Ivan Vazov donis al ĝi preskaŭ ĉion, kion la evoluintaj eŭropaj literaturoj posedis. Per siaj menso kaj koro li staris ĉe nia popolo dum ĉiuj jaroj de sia vivo, konstante kaj fidele. Kaj lia verkaro reprezentas kronikon de la popola vivo, resonon de la sopiroj de nia popolo kaj alvokon por decida paŝo en ĝia historia vojo.

Ivan Vazov apartenas al la generacio de pioniroj de nia nacia Renaskiĝo. Li verkis la himnon de la ribelintoj kontraŭ la otomana jugo en 1876.

Post la frakaso de la ribelo sola espero de nia popolo por pli bona estonteco, por vivo kaj savo estis Rusio.

Per sia amo al Rusio Vazov estas „renesanca“, t. e. popola verkisto. Tiun ĉi amon li elportis el la profunda sino de nia Renaskiĝo, ĝi lin akompanis ankaŭ plue — post la nacia liberiĝo.

Antaŭ la liberiĝo kaj post la Aprila Ribelo (1876) Vazov konsolis kaj donis esperon al nia popolo per la parenceco de Rusio kun Bulgario, per ĝia amo al ni, per ĝia humaneco. Kiel koncize kaj kiel komplete estas reprezentita ĝia grandiozeco, kombinita kun la humaneco:

Rusio! Tiu lando granda
laŭ vasto, forto kaj mezur',
al la ĉielo simila
kaj al l'animo rusa nur!¹

¹ La versoj en ĉi tiu artikolo estas tradukitaj de Asen Grigorov.

La nacia kaj ŝtata konstruado de Bulgario post la liberiĝo bezonis ne nur vastigon de la amplekso kaj la agadsferon de la literatura verkado. Oni devis emfazi, ke la bulgara popolo meritas sian liberecon, ke ĝi digne okupis sian lokon inter la liberaj popoloj. Ivan Vazov kreis verkojn, kiuj pentras la grandajn figurojn de la nacia vekiĝo, la figurojn de tiuj, kiuj kolektis en sia brusto neestingeblan patriotan fajron kaj estis pretaj al ĉiu ajn ofero por la patrujo kaj la libereco, la bildon de la tuta popolo, kiu pagis la liberecon kaj la sendependecon de sia patrolando per peza batalo kaj sangaj oferoj. Tiaj verkoj estas antaŭ ĉio „Epopo de la forgesitoj“ kaj „Sub la jugo“.

„Sub la jugo“ estas granda popola verko. Ĝia karakteriza trajto estas la nacieco. En ĝi estas ŝlosita la sorto de la bulgara popolo. Ĝi montras kiel popolo, pasiginta tutajn jarcentojn „sub jugo“, maturiĝas por decida batalo kontraŭ sia sklaviginto.

La „Epopo de la forgesitoj“ entenas grandiozajn bildojn. Ĝi prezentas ĉion plej bonan, kion ni, kiel popolo, posedas, ĉion, kion ni estimas kaj amas, antaŭ kio ni adorkliniĝas kaj kion ni respektegas. Tiu ciklo de poemoj reprezentas la plej noblajn trajtojn: patriotismo, heroeco kaj oferpreteco, amo al la justo kaj malamo al la malhonoro kaj maljusto. Poemoj kiel „Levski“, „Benkovski“, „Paisij“, „Rakovski“, „La volontuloj sur Ŝipka“ k. a. brilas kiel perloj en nia literatura trezorejo.

Prenu mian libron — testamenton mian.
Oni ĝin reskribu, multobligu ĉiam,
Kie vivas, veas, pereas bulgarioj.
Estas en ĝi graco kaj revelacio,
Ĝi instruas nin kaj inspiras pri ĉio,
ne bedaŭros tiu, kiu legos ĝin,
kiu ĝin ekkonos, scios li sen fin'.

Tiujn parolojn Vazov metas en la buŝon de monako Paisij en la samnoma poemo. Kaj kiel iam en la pasinteco

Paisij de Hilendar penis pravi, ke bulgarioj havis reĝon kaj sanktulojn el sia medio, por konfirmi la bulgaran nacion, tiel nun Vazov penis pravi, ke nia nacio havis eksterordinarajn pionirojn, geniulojn, titanojn, kiuj elmilitis nian novan vivon.

La socio, en kiu vivis kaj verkis Ivan Vazov post la liberiĝo, kaŝis abomenajn malvirtojn. Ni devas rememorigi, ke post la nacia liberiĝo en nia patrujo estiĝis regantaj la kapitalismaj rilatoj. Ĉar ĉe ni la kapitalismo evoluis malfrue, ĝi havis pli da negativaj trajtoj. Ĝi estis treege senskrupula, ĝia rabemo manifestiĝis multe pli forte. La socia kaj morala konscio de la reprezentantoj de la bulgara burĝaro staris sur tre malalta ŝtupo kaj prezentis fortan kontraston al la socia kaj morala konscio de la patriotoj-batalantoj de la antaŭa epoko.

En la bulgara literaturo plenan evoluon ricevis la kritika realismo. La verkistoj — tiu vivanta konscienco de la epoko kaj fidelaj filoj de la popolo — ne povis partopreni en la morala kaj kultura falo de la reganta klaso. Tiuj verkistoj neeviteble devis eniri en konflikton kun la novaj formoj de vivado truditaj de la reganta burĝaro, kun la rabemo de tiu klaso, kun la nove-bakitaj burĝaj politikistoj, kun la nemorala burĝa socio.

Ivan Vazov estas unu el la unuaj inter tiuj ĉi verkistoj. Zorgoplana pri la sorto de la bulgara popolo, li ne kontentigis per tio, ke li revivigas la figurojn de la heroo pasinteco aŭ prikantus la belajojn de la amata patrolando. Li sin adresis al la kuranta socia vivo, en kiu aktivis la herooj de la kapitalo kaj la karieristoj.

La peza stato de la popolo en la kapitalisma socio naskas la socialan poezion, kiu prezentas ĉiaman parton de la kritika realismo. Ivan Vazov estas unu el la kreintoj de la sociala poezio en la bulgara literaturo. Kun sia neordinara kapablo de kreanto li pentris la



bildon de la mizero ĉe la larĝaj laborulaj tavoloj en la kapitalisma mondo en sia versaĵo „Venu vidi nin“. Per ĝi li vokas por helpo, por simpatio, por homeco; li adresas tiun ĉi alvokon al preciza adreso:

Vi, kiuj ripozas en palac' trankvilaj,
al ni proksimiĝu — vi sataj, vi brilaj!
Rigardu tra nia putra plektobaro,
kaj eble stariĝos via hararo!
Venu nin vidi!

Eble pri l'popolo vi iom pripensus
kaj honton, skrupulojn vi eble eksentus,

kaj eble la koro ekbatus dolore.
Sufiĉe vi amis nin sole parole —
Venu nin vidi!

La verkoj de Ivan Vazov estas tradukitaj en rekorde multnombrajn lingvojn. Multaj el ili estas tradukitaj ankaŭ en Esperanton. En la tempo de lia 125-jariĝo devo de la bulgara esperantistaro estas daŭrigi la popularigon de lia verkaro en Esperanto, malkovrante per tio la historion, la moralajn valoraĵojn kaj la animon de la bulgara popolo.

IVAN VAZOV PRI ESPERANTO

La 12-an de marto 1915 la konata bulgara esperantisto Ivan Ĥ. Krâstanov vizitis Vazov en lia domo. Antaŭ li la poeto deklaris:

Vi povas sciigi, ke mi aprobas vian noblan ideon kaj la lingvon Esperanto kiel solvon de la problemo pri internacia lingvo.

El la libro „Za meĵdunarodnija ezik. Anketa“. (Pri la internacia lingvo. Enketo), Sofia, 1922, p. 6.

Lige kun la traduko de la romano „Sub la Jugo“ la tradukinto Ivan Ĥ. Krâstanov tiutempe loĝanta en Berno, Svislando, ricevis de Vazov la jenan leteron:

„Mian permeson vi havas. Mi dankas al vi, ke per via traduko vi konatigos la Esperantan mondon kun miaj verkoj. Mia opinio pri Esperanto: ĝi estas la plej perfekta ĝis nun artefarita lingvo, kreita kun la celo proksimigi la homaron kaj igi la komunkulturajn valoraĵojn pli atingeblaj por ĝi.“

Revuo „Esperanto“, XVI, 7 — 8, julio — aŭgusto 1920, p. 141

Poezio kaj beletrio

Ivan Vazov

LA EMOCIOJ DE RADA

Fragmento el la romano „SUB LA JUGO“

... Rada senĝene ordigis la lernantinojn sur la benkojn kaj mallaŭte donis al ili kelkajn instrukciojn. Ŝia aminda vizaĝo, vivigata de emocio pro la solena horo, kaj lumigata de ŝiaj grandaj humidecaj okuloj, estis ĉarme belega. Diafanaj rozkoloraj nubetoj, ludantaj sur ŝiaj vangoj, perfidis la vibradon de ŝia senĝena animo. Rada sentis, ke cento da scivolemaj rigardoj falis nun sur ŝin, ŝi ĝenis sin kaj perdis sinregon. Sed tuj post kiam la ĉefinstruisto komencis sian paroladon

kaj altiris al si la atenton, Rada sentis sian animon faciligita, pli serena kaj ĵetis pli kuraĝan rigardon ĉirkaŭ kaj antaŭ sin. Ŝi rimarkis kun ĝojo la foreston de Kiriak Stefĉov. Ŝia kuraĝo revenis. La parolado finiĝis ĉe solena silento (tiam ankoraŭ ne estis enkondukita la kutimo aplaŭdi per manoj). Oni komencis la ekzamenon de la unua klaso, laŭ la programo. La bonanima kaj trankvila vizaĝo de la ĉefinstruisto Kliment kaj lia milda parolado inspiris memfidon al la junulinetoj. Kun

streĉita atento Rada sekvis iliajn respondojn, kaj iliaj hazardaj konfuziĝoj pentriĝis dolore sur ŝia vizaĝo. Tiuj sonoraj kaj klaraj voĉetoj, tiuj malgrandaj kaj rozkoloraj buŝetoj, kiuj petis pri kisoj, estis decidontaj ŝian sorton. Ŝi superverŝis ilin per sia bela rigardo, kuraĝigis ilin per sia anĝela rideto kaj transdonis sian tutan animon al iliaj tremantaj lipoj.

En tiu momento la homamaso ĉe la pordo dividiĝis kaj ebligis liberan trapason al du malfruigintaj vizitantoj, kiuj sidiĝis senbrue sur la neokupitaj seĝoj. Tiam Rada ĵetis rigardon al ili. Unu, la pli aĝa, estis la lerneja kuratoro ĉorbaĝi Miĉo, kaj la alia — Kiriak Steŝov. Nevole ŝia vizaĝo iom paliĝis. Sed ŝi penis ne vidi tiun malagrablan homon, kiu konfuzis kaj timigis ŝin.

Kiriak Steŝov interŝanĝis kelkajn salutojn per la kapo, krucis la kruojn kaj ekrigardis malserene-aroĝe. Sur lia vizaĝo sin esprimis anima sekeco kaj krueleco. La instruisto Kliment turnis sin kun libreto al Miĥalaki Alafranga, Miĥalaki kapneis kaj diris, ke li ekzamenos pri la franca lingvo. La instruisto turnis sin dekstren kaj ripetis la inviton al Steŝov. Li akceptis kaj ekmovis sian seĝon iom pli antaŭen.

Obtuza murmurado aŭdiĝis en la homamaso. Ĉiuj direktis siajn rigardojn al Kiriak. La lernobjekto, pri kiu oni ekzamenis, estis bulgara historio. Steŝov metis la libron sur la tablon frotis sin iom inter la brovo kaj la orelo, kvazaŭ por veki sian menson kaj laŭte starigis demandon. La junuliento silentis. La glacia, malafabla rigardo de Steŝov penetris kiel frosto en ŝian infanan animon. Ŝi konfuziĝis kaj plu ne sciis, pri kio oni demandas ŝin. Ŝi ĵetis kortuŝan demandon al Rada, kvazaŭ petante helpon. Steŝov ripetis la demandon. La knabino silentis plu.

— Ŝi iru al sia loko, — li diris seke al la instruistino, — alvoku iun alian.

Eliris alia knabino antaŭen. Steŝov demandis ŝin. Ŝi aŭdis, sed ne komprenis la demandon kaj restis silenta. Silenta estis ankaŭ la tuta publiko, ekposedata de ia peniga sento. La junulineto staris kiel alnajlita, sed ŝiaj okuloj pleniĝis de larmoj pro sufero, kiuj tamen ne kuraĝis guti. Ŝi streĉis sin, por ion respondi, sed ekbalbutis penige kaj eksilentis. Steŝov ĵetis glaciigan rigardon al Rada kaj elgrumblis:

— Sufiĉe malzorgeme oni instruis la infanojn. Alvoku alian lernantinon.

Per obtuza voĉo Rada prononcis alian nomon.

La tria lernantino respondis ion tute alian: ŝi ne komprenis la demandon. Vidinte malaprobon en la rigardo de Steŝov, ŝi ekmiris kaj senespere ĉirkaŭrigardis. Steŝov starigis al ŝi alian demandon. Tiun fojon la knabino respondis nenion. La konfuziĝo nebuligis ŝian rigardon, ŝiaj sensangigitaj lipoj ekstremis kaj subite ŝi laŭte ekploris, kaŝinte sin ĉe sia patrino. Ĉiuj sentis doloron kaj ian pezon en la animo. La patrinoj, kies filinoj ankoraŭ ne estis alvokitaj, rigardis perplekse kaj timigite antaŭ si. Ĉiu patrino tremis pro timo, ke ŝi aŭdos la nomon de sia infano.

Rada staris kiel konsternita. Eĉ guto da sango ne restis plu en ŝia vizaĝo; martiraj tremoj trakuris ŝiajn paligintajn vangojn; sur ŝia frunto, kie antaŭ momento oni legis tiom da delikataj emocioj, perlis kelkaj grandaj gutoj da ŝvito, malsekiginte ŝiajn tempiojn. Ŝi ne kuraĝis levi la okulojn. Ŝi sentis sin kvazaŭ fundeniĝonta en la teron. Io premsufokis ŝian bruston, ŝi preskaŭ volis laŭte ekplori kaj apenaŭ regis sin.

La publiko plu ne povis elteni tiun streĉitan staton kaj ekbruis maltrankvile. La ĉeestantoj interrigardis sin konfuzitaj, kvazaŭ ili volus demandi sin: kio okazas? Ĉiu volis eskapi el tiu peniga situacio. Nur sur la triumfanta vizaĝo de Steŝov pentriĝis kon-



tento. La bruo kaj grumblo kreskis. Subite ekregis tomba silento kaj ĉiuj rigardoj direktiĝis antaŭen. El la publiko eliris Bojĉo Ognjanov, kiu ĝis nun staris nerimarkite kaj turninte sin al Stefĉov, diris firme:

— Sinjoro, mi ne havas honoron koni vin, sed pardonu. Viaj demandoj, malklaraj kaj abstraktaj, povus embarasi eĉ lernantinojn de la V klaso. . . Kompatu tiujn ĉi nespertajn infanojn. . .

Kaj, turninte sin al Rada, li demandis:

— Fraŭlino, ĉu vi permesos?

Kaj ne sidiĝinte, li petis ke oni alvoku unu el la jam ekzamenitaj knabinoj.

Oni eksentis ĝeneralan faciligon. Simpatia kaj aproba bruo renkontis la manifestadon de Ognjanov. En palpebruma daŭro li altiris ĉies rigardojn, gajnis ĉies simpatiojn. La semita de Haĝi Rovoama kalumnio falis. Lia nobla vizaĝo, surverŝita de suferula paleco kaj lumigata de vireca kaj energia rigardo, konkeris nerezisteble la korojn. La vizaĝoj de la ĉeestantoj sereniĝis, la brustoj libere spiris. Ĉiu vidis, ke Ognjanov regas la situacion. Ĉiuj estis kontentaj.

Tute simple Ognjanov demandis la knabinon pri la sama aĵo, pri kiu demandis ŝin ankaŭ Stefĉov. Nun ŝi respondis. La patrinoj sopiris pro faciligo kaj sendis dankemajn rigardojn al la fremda homo. Lia nomo, nova kaj stranga, ĉirkaŭiris ĉies buŝon kaj presis sin en ĉies koro.

Oni alvokis la alian knabinon. Ŝi ankaŭ, laŭ sia aĝo, respondis kontentige.

Tiam ĉiuj infanoj, timigitaj terure nur antaŭ kelkaj minutoj, fiksas amike siajn rigardojn al Ognjanov. Ĉies kurajo plialtiĝis; ili nun eĉ komencis disputi, kiu el ili eliru la unua por interparoli kun tiu bona homo, kiun ili jam ekamis.

Nun Rada pasis de unu mirkonsternego al alia. Mirigita, kortuŝita ĝis larmoj, surprizita, ŝi rigardis dankeme

al tiu grandanima homo, kiu helpis ŝin en tia peza minuto. Por la unua fojo ŝi renkontis, kaj ja ĉe nekonato, varman kaj fratan partoprenon. Ĉu tiu homo estis spiono! Li nun staris kiel ŝia gardanta anĝelo! Li piedpremris Stefĉov kiel vermon. Ŝi triumfis, ŝi elkreskis denove, ŝi ekrigardis fiere kaj feliĉe ĉien kaj ĉiuflanke ŝi renkontis simpatiantajn rigardojn. Ŝia koro pleniĝis de dankemo, ŝiaj okuloj — de larmoj. . .

Al la tria knabino Ognjanov starigis la demandon:

— Rajna, diru al mi, ĉe kiu bulgara reĝo la bulgaroj fariĝis kristanoj, estis baptitaj?

Kaj li rigardis milde kaj amike la senkulpajn okuletojn, turnitajn al li, en kiuj ankoraŭ vidiĝis spuroj de larmoj.

La knabineto pripensis iom, ekmovis siajn lipojn kaj per voĉeto klara, dolĉa kaj sonora, kiel de alaŭdo, kiu kantas frumatene en la aero, ekkriis:

— La bulgara caro Boris baptigis la bulgarojn!

— Tre bone, brave, Rajna. . . Diru nun al mi, kiu inventis la bulgaran alfabeton?

Tiu demando nun iom embarasis la knabinon. Ŝi preskaŭ fermis palpebrojn, kvazaŭ por alvenigi al si la respondon, malfermis la buŝon por diri, sed haltis hezitante, jam preta konfuziĝi.

Ognjanov helpis ŝin:

— Nian A, B, C, Rajna, kiu verkis ĝin?

La infana rigardo eklumis. Rajna etendis sian ĝis la kubuto nudan delikatan brakon, ne dirante ion ajn. Ŝi montris al la portreto de Kiril kaj Metodij, kiuj rigardis favore al ŝi.

— Jes, jes karulineto, la sanktaj Kiril kaj Metodij, — aŭdiĝis kelkaj aliancanaj voĉoj de la antaŭaj seĝoj.

— Longan vivon donu al vi dio, Rajna. La sanktaj Kiril kaj Metodij helpu vin ankaŭ iĝi carino, — kortuŝite elbabilis popo Stavri.

— Brave, Rajna, sidiĝu, — afable diris Ognjanov.

Radiante pro ĝojo kaj konsciante sian triumfon, Rajna alkuris al sia patrino, kiu ĉirkaŭbrakis kaj premis ŝin al sia brusto, surŝutante ŝin per ŝormaj kisoj kaj larmoj.

Ognjanov turnis sin al la instruisto Kliment kaj redonis al li la libron.

— Sinjoro, pridemandu ankaŭ nian Sâbka, — diris ĉorbaĝi Miĉo al Ognjanov.

Vigla blondhara knabineto jam staris antaŭ li kaj milde rigardis lin en la okulojn. Ognjanov pensis iom da tempo kaj poste demandis:

— Sâbka, diru al mi, kiu bulgara caro liberigis la bulgarojn el la greka jugo?

— El la turka jugo liberigis la bulgarojn... — erare komencis la knabineto.

Miĉo ĉorbaĝi diris laŭte:

— Haltu, Sâbka! Infano mia, diru la nomon de la caro, kiu liberigis ilin el la greka jugo, ĉar estas ja caro, kiu liberigos ilin el la turka jugo...

— Kion dio destinis, tio nepre realiĝos, — aldiris popo Stavri.

La simple-anima aludo de ĉorbaĝi Miĉo elvokis kunsentan rideton sur multaj vizaĝoj. Flustrado kaj obtuzaj subridoj aŭdiĝis tra la salono.

Sâbka ekkriis sonore:

— El la greka jugo savis la bulgarojn caro Asen, kaj el la turka jugo savos ilin caro Aleksandro de Rusio.

Ŝi miskomprenis la vortojn de sia patro.

Post tiuj vortoj de la lernantino la tuta salono silentiĝis.

Sur multaj vizaĝoj pentriĝis perplekso kaj maltrankvilo. Aŭtomate ĉiuj ĵetis rigardojn al Rada, kiu ruĝiĝis konfuze kaj klinis la kapon. Ŝia brusto leviĝis pro emocio. Kelkaj rigardoj estis riproĉaj, aliaj — aprobaj. Sed ĉiuj sentis sinĝenon. Stefĉov, ĝis nun sidante kvazaŭ frakasita, levis denove la kapon kaj ĉirkaŭrigardis kiel venkinto. Ĉiuj konis liajn intimajn rilatojn kun la bejo kaj lian amemon al la

turkoj kaj volis tralegi ion sur lia vizaĝo.. La sampartianoj de Stefĉov malice kaj laŭte grumblis, kaj la bonvolaj al la instruistino silentis. Sed estis aliaj, kiuj ne malpli sentime deklaris sian opinion favore al Rada kaj Ognjanov. Onklino Ginka eĉ kriis tiel laŭte, ke oni aŭdis ŝin ĉirkaŭe:

— Kial do vi tiel konsterniĝis? Ĉu per siaj vortoj la knabino dion krumumis? Ŝi diris ja nur la veron! Mi ankaŭ deklaras, ke caro Aleksandro savos nin, neniu alia!

— Silentu vi, frenezulino! — murmuris ŝia patrino al ŝi.

Sâbka mem staris kiel brogita. De sia patro kaj de liaj gastoj ĉiutage ŝi estis aŭdinta la samajn eldirojn kaj ne komprenis pro kio okazis nun tiu murmurado.

Stefĉov ekstaris kaj turnis sin al la antaŭaj seĝoj:

— Sinjoroj, ĉi tie oni semas revoluciajn ideojn kontraŭ la ŝtato kaj kontraŭ lia imperiestra moŝto la sultano. Plu mi ne povas resti ĉi tie kaj mi eliras...

Neĉo Pironkov kaj ankoraŭ tri-kvar personoj sekvis lin. Sed la ekzemplo de Stefĉov ne trovis aliajn imitantojn.

Post minuta konsterniĝo oni vidis, ke la okazintaĵo ne meritas atenton. Iu infano senkulpe estis dirinta kelkajn nekonvenajn, sed verajn vortojn... ĉu tio estis krimo? Denove ekregis silento kaj samtempe ankaŭ la unua simpatio al Ognjanov, kiu nun de ĉie ricevis amikajn rigardojn. Hodiaŭ li estis la heroo; li havis ĉe sia flanko ĉiujn honestajn korojn kaj ĉiujn patrinajn.

La ekzameno daŭris kaj finiĝis tute trankvile.

La lernantinoj ekkantis kaj la publiko komencis disiri kontenta. Kiam Ognjanov proksimiĝis al Rada por adiaŭi ŝin, ŝi respondi al li emociite:

— Sinjoro Ognjanov, mi dankas vin elkore pro mi kaj miaj junulinetoj. Mi neniam forgesos vian komplezon.



III

Ne estis ĝi milit',
sed pesto perfidanta,
pendanta super stepoj,
super luliloj
en la junia tag'...

Leviĝu,
land' giganta!

Al mortbatal' —
atak'!

Ne estis ĝi milit',
sed homa muelejo.

Ektremis tuta mond'!
Kuraĝ', popol-granit'!

Leviĝu,
land' giganta!

Leviĝu
al batal'!

Nun temis:
ĉu ekzistos plu Oktobro?

„Aŭrora“¹,
eksonis ree via salv'!

Leviĝu,
land' giganta!

Leviĝu
al batal'!

IV

La histori' memoras!
Neniam la homar' forgesos

de Volga la pasejojn sangajn,
nek la malsaton,
dum la blokad',
de Leningrad'

kaj kiel en Ladoga-lago
la ĉaroj kun la pano dronas...

Sed mankas voj' returna:
se unu ĉaro dronas —

aliaj sur la vojo de l' vivo plu kolonas.

La histori' memoras!
Forviŝi povas ja nenio
de Tanja² la taglibron...

(ĉu aŭdis vi la vortojn, dio?)

kaj tiun teruregan, epopean
koncerton de subtera simfonio
sonantan super la tranĉeoj

kaj la infanojn
ridetantajn en glacia agonio —
de Ŝostakoviĉ Sepa Simfonio!

V

La Zoja³-pendumilo
estas sonorilo!
Matrosov⁴ — flago,
Koŝevoj⁵ — minaca ago!

Kaj iĝis ĉiu domo
Brest'a⁶ citadelo!

Ĉiu tranĉeo —
Mamaev Kurgan⁷!

Ĉiu brusto —
ŝtalo el Uralo!

Mort' —
ĉiu fusilo
kaj revolver'!

Sendis tankojn
kartoĉojn
obusojn
trotilon

sendorma malfront'.
Ne, mankis malfront'!
Kaj for de Moskvo
estis ĉio

ununura frontlinio!
Surmetas la emerito
la palton de milito,
ĉe la turnilo

stariĝas junpioniro
kaj lia patrino vidas kun miro,
ke ŝia infano —

la knabo —
iĝis viro!

Vatjakoĵ mankas,
peltbotoj mankas,
sed estas unu
respondeco

granda!

Kaj se estas iu legendo sankta,
legendo inda

por gloro kaj kanto, —
ĝi estas la granda aloj

nomata
soveta homo,
soveta animo,
soveta popolo,
soveta ŝtato!

Ne, ne estis malfronto!
Kaj for de Moskvo estis ĉio

Kaj ŝia profunda rigardo lumis varme.
— Fraŭlino, mi estis iama instruisto
kaj mi partoprenis vian situacion. Mi
nur plenumis mian devon. Mi gratulas

vin pro la bonaj sukcesoj de viaj ler-
nantinoj, — diris Ognjanov kaj eliris.
Post lia eliro Rada plu nenium vidis
el la gastoj, kiuj venis adiaŭi ŝin.

ununura
 frontlinio!
 Frostas la fingroj.
 La ejo — glacia.
 Sed tankojn volas
 venkmarŝo nia,
 volas kanonojn,
 aviadilojn!
 Konstrui novajn fabrikojn
 sur nuda kamparo!
 Ĝi urĝe postulas modelon — kaj ĝi pretas:
 Tupolev⁸ deĵoras,
 Koroljov⁹ ne dormas,
 kaj — vidu! —
 teren flugas
 en flamo
 kun fulma rapid'
 de nova ĉasaviadilo
 trafita Messerschmied!¹⁰
 Kaj morgaŭ estos
 pugnobato nova
 sur la tuta fronto! —
 surprizo Ĵukova!¹¹
 Morgaŭ estos sako
 Moskvo-maniera —
 de Rokosovskij¹² al fŭhrer¹³
 donaco severa!
 Okul' por okulo!
 Dento por dent'!
 Morto por mort'!
 „Panfilov-soldatoj!¹⁴
 Moskvo estas post nia korp'!
 Simple neniŭ paŝo por cedo restas plu!
 Ĉiu el vi devas batali por du!...“
 Kanonado la teron
 plugas kaj skuas jam,
 kaj limo estiĝas
 la ŝoseo de Volokolamsk!
 Marŝal' Guderian¹⁵,
 vi neniam supozis probable,
 ke la rusoj batalos
 diable,
 ke tiu ĉi ocean' Siberia —
 vastega kaj pina —
 naskos novajn Kutuzov kaj Suvorov¹⁶,
 ke tiu ĉi tero betula, senlima,
 kiel senfina ocean',
 enteniĝas en neniŭ plan',
 eĉ se ĝi estus la plan' „Barbarossa“¹⁷!
 Moskvo rebatis per sia brust'
 la hunojn el ŝtalo!
 Ho, Moskvo, Moskvo,
 komenco de l'spirata finalo!
 Krue la lecion':
 se vi bruligas fajron en junio,
 pretiĝu en majo
 forbruli en la incendio!

VI

Kaj eble en ĉi tiu maro
 el sango, sufero, amaro

estis nur eta nia
 manpleno da am',
 eble en tiu infero
 de homaj ĝemoj
 estis nia alvoko
 nura fajrero.
 La amikeco
 ne volis fortojn.
 Ŝipka¹⁸ estis komuna sort'.
 Aŭdis Bulgario
 la 22-an de junio:
 „Bulgaroj,
 al batalo ĝis mort'!“
 La lando de Botev kaj Levski¹⁹
 ne estis plu
 sklava land',
 ĉar sur Balkano²⁰ eksonis
 ribela kant'.
 Vekiĝu,
 gastojn vi havas,
 ho, Pirin-montaro²¹!
 Fariĝu denove popolprotektant',
 vualita en nuboj Murgaŝ²²!
 Ni mortos por vi,
 kara patrino-land'!
 Hej, Balkano nia!
 Balkano — ŝirmant'!
 Kaj ĉiun nokton —
 sur la muroj de l'domoj,
 sur la senfina mur' de l'kazerno,
 sur bariloj kaj bazaroj
 remsistoj²³ skribis:
 „Morton al la faŝismo!
 Aliancon kun USSR!
 Vivu la Ruĝa Armeo!“

VII

Kaj fariĝis la milito ne simple front',
 sed kontraŭ faŝismo
 naŭa ond'!
 „Batu la malamikon!
 Ke li ne plu aktivu!“ —
 fajran polonezon
 ludas Varsovio!
 „Homoj, atentu! . . .“ —
 de l' rezisto la flago
 flirtas en Bratislavo kaj Prago.
 „Al batal', hungaroj!
 Sufiĉe nin tretis boto ĝismorte!
 Morton al Esterhazy kaj Horthy²⁴!
 Bukureŝt' estas hirta.
 Beograd' — bastiono.
 Batu la faŝiston!
 Ĝis mort'!
 Sen pardono!
 Parizo, vi ne dormas!
 Allons, enfants de la patrie²⁵!
 Ŝargas botelon per trotilo.
 Frederiko Jolliot-Curie²⁶!
 Kaj iĝis la milito
 ne simple front',



sed kontraŭ faŝismo
 naŭa ond'
 kaj luma vojeto, kondukanta
 al kvietaj spaco
 de espero kaj paco. . .
 Eĉ iluziito
 jam klare vidas!
 Estas la milito
 ne dua monda,
 sed dua lasta.
 Kaj estu damnita
 kapo tia,
 kiu pensos
 pri tria!

VIII

Diru,
 ĉu estas sur tiu ĉi tero,
 sub tiu ĉi volbo ĉiela,

radia kaj stela,
 alia patrin', ricevinta
 20 milionojn da leteroj:
 „Via filo heroe pereis . . .“ ?
 Tiu patrino vivas.
 Ŝi pro dolor' ne pereis.
 Ŝi perdis 20 milionojn da filoj.
 Jam tridek jarojn ŝi atendas kun amaro
 ke Jegoruŝka²⁷ saltu el la vagonaro. . .
 Tiu patrin' estas viva.
 Ŝi pro dolor' ne pereis.
 Ŝi perdis
 20 milionojn da filoj.
 Ŝi nomiĝas Rusio.
 Ŝi nomiĝas Soveta Patrio.

Tradukis el la bulgara: ASEN GRIGOROV

¹ „Avrora“ — krosŝipo, kiu per salvoj de siaj kanonoj donis la signalon por sturmo kontraŭ la Vintra Palaco. Per tio komenciĝis la Granda Oktobra Revolucio.

² Pri Tanja (Tanja Saviĉeva), vd. „B. E.“ № 3-4/1975, p. 16.

² Zoja Kosmodemjanskaja — juna soveta patriotino-partizano, pendumita de la hitleranoj en 1941.

⁴ Aleksandro Matrosov — en 1943 per sia korpo kovris la embrazon de malamika fortikaĵo por sekuri la ofensivon de sia roto.

⁵ Oleg Koŝevoj — juna soveta patrioto, gvidanto de konspira junkomunista organizo en Krasnodon kontraŭ la germanaj okupantoj; kruele torturita kaj mortigita de la faŝistoj en 1943, nur 17-jara.

⁶ Brest — urbo en Blankrusio, heroe defendita „ĝia la lasta homo“ de la soveta milittrupo kontraŭ la germanaj faŝistoj en la Dua Mondmilito.

⁷ Altaĵo en Stalingrad (nun Volgograd), kie la sovetaĵ soldatoj ĝismorte batalis kontraŭ la germanaj faŝistoj.

^{8, 9} Tupolev, Koroljov — famaj sovetaĵ konstruantoj de novaj, modernaj aviadiloj.

¹⁰ Legu Meserŝmid.

^{11, 12} Ĵukov, Rokosovskij — famaj militestroj — marŝaloj de USSR.

¹³ Führer (fjurer=gvidanto) t. e. Hitler.

¹⁴ Soldatoj de generalo I. V. Panfilov, kiuj en 1941 gloriĝis pro sia heroa batalo kontraŭ la germanaj trupoj ĉe la ŝoseo Volokolamsk — Moskvo. Ĉiuj ĉekape kun sia komandanto, gen Panfilov, mortis.

¹⁵ Guderian — hitlerista generalo, specialisto pri tank-milito.

¹⁶ Kutuzov, Suvorov — famaj rusaj militestroj.

¹⁷ Plano „Barbarossa“, t. e. la hitlerista plano pri invado en Sovetunion.

¹⁸ Ŝipka — vilaĝo en la piedoj de Balkan-montaro. Apud ĝi kaj sur la proksima montopinto Stoletov okazis grandaj, decidaj bataloj de la liberiga rusa armeo kaj la bulgaraj volontuloj kontraŭ la turka armeo en la Rusa-Turka milito (1887-88).

¹⁹ Botev kaj Levski — elstaraj bulgaraj revoluciuloj, batalantaj kontraŭ la otomana jugo.

^{20, 21, 22} Balkano, Pirin, Murgaŝ — montoj en Bulgario, prikantitaj en poezio kaj kantoj.

²³ Remsistoj — t. e. anoj de RMS — nelegala junkomunista unuiĝo en kapitalisma Bulgario.

¹⁴ Esterhazy, Horthy — hungaraj reakciaj ŝtatestroj, servintoj de Hitler.

²⁵ „Antaŭen, infanoj de l'patrio!“ — la komencaj vortoj de la fama franca batalmarŝo „Marseljezo“.

²⁶ Fr. Joliot-Curie (Ĵolio Kjuri) — fama franca fizikisto kaj progresema sociaganto.

²⁷ Jegoruŝka — populara kaj ofta rusa nomo.

Ho, kiel la homar' soifas pri justo, paco kaj feliĉo!

Ivan Vazov

TRI RENKONTOJ

Rememoroj de ĵurnalisto

Inter miaj rememorindaj dummilitaj renkontoj tri estis siaspecaj, kunligitaj per unu signifo. Pri ili estos la parolo.

La unua

Fine de februaro 1945 la rapida militvagonaro veturis al la soveta-germana fronto, kiu jam proksimiĝis al Berlino. Preter la vagonoj kuris la multsuferinta tero de Pollando.

Antaŭ vesperiĝo ni alvenis la detruitan Varsovion. Neatendite nia regimento estis elvagonita.

Mia plotono dislokiĝis en 4-etaĝa domo, kies fenestroj estis tute senvitraj, kvankam la vetero frostis. La estro ordonis al mi trarigardi la loĝejon — eble mi trovos ĉambron pli oportunan por loĝado.

En la subtera etaĝo, malferminte ian pordon, mi subite vidis en eta ĉambro virinon. Ŝi ion kudris. Ŝia aspekto — malgraso kaj delikateco, paleco kaj senforteco — emociis min. Ŝajnis, ke antaŭ mi estas ne homo, sed ties ombro. Ŝia mallonga hararo parolis pri antaŭ nelonga grava malsano. La tristaj okuloj, la mirinde bluaj okuloj de la virino varmiĝis, kiam ŝi vidis min. Mi petis pardonon kaj intencis foriri, sed subite en miajn okulojn sin ĵetis la verda steleto sur la ĵaketo, kroĉita sur najlo.

— Esperantistino? — mi ekdemandis.

— Jes, jes! — kun ĝojo kaj miro respondis la virino.

Post minuto mi jam sidis sur la ligna kesto kaj la konversacio vigliĝis. Celina Navodna rakontis pri la teruraj travivaĵoj dum la faŝista jugo.

— Mi troviĝis en la infero! Preskaŭ du jarojn daŭris tiu surtera infero! — komencis rakonti la polino per kolera voĉo.

Gestapo disigis ŝin de la edzo kaj fileto, kiujn ŝi ĝis nun ne trovis. La senkulpan virinon oni ĵetis en la kon-

centrejon Oswiencim-Birkenau.

Celina montris al mi la kvinciferan numeron tatuitan sur unu el la brakoj.

— Vidu sub ĝi la triangulon. Ĉu vi scias ties signifon? Mortverdikto! Mi, ni ĉiuj, ne esperis vivi, ĉar miloj estis forbruligitaj. Feliĉo, granda feliĉo, ke alvenis la Ruĝa armeo kaj savis nin! Malbenitaj dukruraj bestoj, eĉ nian Esperanton ili surverŝis per koto!

Kaj mi eksciis, ke Celina en la koncentrejo kontaktis kun du esperantistinoj — francino kaj belgino. La interkompreno, donita al ili de la komuna ideo, iom faciligis la suferojn. Foje Celina renkontis la trian „samideanon“. Li estis SS oficiro.

— Ho, kia kanajlo! — ekkriis la virino. — Mi konatiĝis kun tiu Rolf Reiner dum Universala Kongreso, kaj poste interkorespondis „Ĉarmulineto Celina“ li nomis min, kaj mi lin — „kara amiko“. Amiko! En la koncentrejo li ne rekonis min — senhararan, ĉifonvestitan, nudpiedan! Foje pro bagatela kulpo li intencis bati min per bastono kriante:

— Du, verfluchtes Schwein! (Vi, malbenita porko!)

Nur tiam mi nomis min, ĉar mia singardo atingis la limon! Eĉ morto ne plu timigis min. Li apenaŭ ekkonis min, la iaman „ĉarmulineton“, kaj mallevis la bastonon.

— Estas nobla servo por esperantisto apud gasĉambroj! — diris mi al Rolf.

— Dum milito soldato ne rajtas malobei ordonon, — malice respondis la hitlerano kaj foriris.

Poste mi por li estis nereconebla. Jen, amiko, tiel la faŝismo transformis homon en beston! Esperantisto fariĝis buĉisto! Mi petegas — ekstermu kaj ekstermadu la faŝistojn, ĉiujn ĝis la lasta! Ili ne estas homoj!

Mi ne rajtis longe esti for de mia



armetrupe, tial mi adiaŭis, ricevinte la permeson de Celina gastigi al ŝi la sekvan tagon. Mi intencis havigi al ŝi iujn nutraĵojn. . . Sed dum la sama nokto nia regimento daŭrigis sian vojon. La fronto nin vokis!

Dumvoje mi pensadis pri Celina, kiu ravis min per sia virina kuraĝo. Ŝi estis vere honesta, mirinda virino. Sed tiu Rolf—faŝista nutrato! Por kiu celo li lernis la Internacian Lingvon, la lingvon de amikeco kaj humaneco! Faŝismo kaj Esperanto estas nekunigeblaj. Jes!

Tiel pensante, mi ne dubis, ke inter la germanaj samideanoj estas ankaŭ niaj veraj amikoj, ke la tempo ilin malkovros.

La dua

Nia militvagonaro haltis, por ke ni iomete ripozu post la longa kaj rapida kurado al la fronto. Ĉi staris apud trajno, kiun konsistigis hejteblaj ŝargvagonoj, plenaj de malgrasaj laŭte parolantaj homoj, kies lingvo estis simila al Esperanto.

Ekvidinte sur mia uniformo la bukon kun bildo de ankro (infanteriano, mi portis ĝin por „plibeligo“!), iu el tiuj civitanoj ekkriis:

— Marino!

— Ne, maristo! — korektis mi en Esperanto.

— Maristo! Esperantisto! Hura! — ekkriegis tiu junulo, tuj saltis sur la teron, sin ĵetis al mi kun etendita mano kaj diris ĝoje: — Amiko! Ruĝa soldato! Bonan tagon!

Mi ankaŭ saltis sur la teron kaj ni forte manpremis.

— Dankon, amiko, dankegon al vi, al via nevenkebla armeo! Sen ĝi mi ne vidus la gepatran Italujon. Malbenitaj faŝistoj!

La junulo levis pugnon kaj minacis per ĝi al okcidento. Li daŭrigis:

— Venos ilia malglora fino! Nun ni ne estas laborbrutaro de Hitler! Nun ni veturas hejmen! Mi tre ĝojas vidi rusan esperantiston kaj tion diri al vi.

Vivu la rusaj soldatoj! — ekkriis la italo kaj svingis per mano al siaj kamaradoj en la vagono. Ili ĉiuj tuj hore ekkantis la rusan popularan kanton „Katjuŝa“. Kaj ili kantis kun tia entuziasmo kaj impeto, tiel mansvingis kaj laŭte piedfrapis la taktojn, ke mi estis surprizita. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke tiu kanto estas la himno de la batalantoj de la italia rezista movado.

— Envagoniĝu! — subite eksonis ordono por ni.

— Adiaŭ, amiko, veturu feliĉe hejmen! — mi diris al la italo.

— Jam?! Kia mallonga renkonto! — li malĝojigis. — Adiaŭ! Estu pli baldaŭ la venko!

La trajno ekmoviĝis kaj niaj manoj disiĝis. . .

— Amiko, memoru mian adreson! — kriis la italo, — Vinĉenco Kassini, urbo Mantova, strato. . .

Sed la bruoj de la pli kaj pli rapidiĝanta trajno obtuzigis la voĉon.

Denove mi kuŝiĝis sur la breton. Estas bona por pensado tia loko, kiam frapadas la radoj kaj ritme balanciĝas la vagono. Pli kaj pli malproksimiĝis malantaŭe la Patrujo, jam purigita de la bruna pesto, kuracanta siajn terurajn vundojn, sendinta min kaj nin ĉiujn okcidenten al nobla batalo. Tri jarojn kaj ok monatojn mi portis militveston. Trifoje mi estis vundita. Jen post la tria vundo mi denove estas en la batalvicoj. Kaj miaj amikoj, kie ili estas nun? Antaŭ miaj okuloj preterpasis tiuj, kun kiuj min ligis la juneco. Jen malrapide venis al mi du samideanoj, kiujn mi neniam vidis kaj aŭskultis. Ili loĝis eksterlande — Ljubomir en Bulgario, Simon en Francio. Miaj leteroj al Ljubomir estis sendataj pere de Simon, ĉar la bulgaraj faŝistoj kruele persekutis ĉiun homon, kiu ricevis leteron el Sovetunio.

Mi, Ljubomir kaj Simon, dank'al korespondado en Esperanto, amikiĝis kaj formis konfideman triopon sur la

bazo de la proksimaj interesoj. Mi kaj Ljubomir estis junkomunistoj. Simon, kiel amiko, havis nian fidon.

La lastan leteron (pli precize, kiel kutime, du iliajn leterojn en unu koverto!) mi ricevis en la somero de 1940. La Dua Mondmilito ĉesigis la interkomunikojn.

Do, kia nun estas ilia sorto? — pensis mi. Eble Ljubomir estas malliberigita aŭ eĉ ekzekutita? Kiaj rilatoj kun germanoj formiĝis ĉe Simon? Se mi ricevus de ili almenaŭ po tri vortojn! Sed ambaŭ estos troveblaj nur post la finmortigo de la hitleranoj en ilia bestkuŝejo.

— Rapidu, trajno, — flustris mi, — rapidu al la fronto!

La tria

En la lastaj tagoj de aprilo nia plotono ekiris al Berlino. Nin ĉirkaŭis teruraj ruinoj. Inter ili ŝvebadis lanugoj de litkusenoj. El ĉiuj fenestroj pendis littukoj kaj blankaj ĉifonoj — signoj de kapitulaco de l'loĝantoj. En la ĝardenetoj regis admirinda printempo. Abunde floris pomarboj. Sed pli abunde en la urbo ruĝis sango. La lasta sango!

Ni marŝis kaj marŝis al tiu parto de la ĉefurbo, kie ankoraŭ rezistis la malamiko, defendanta sian senesperan aferon.

Ni marŝadis jam de la mateniĝo, kaj la komandanto permesis halti kaj iom ripozi. Ni aliris trotuaron. Baldaŭ sur la strato mi ekvidis longan kaj strangan homvicon, kiun konsistigis apartaj grupoj de civilaj homoj. Super ĉiu grupo leviĝis nacia flageto — itala, belga, hungara, franca. La kolono ankoraŭ haltis por ripozo. Apud ni ekstaris la francoj. Mi tuj ekmemoris pri Simon. Alirinte la grupon de la francoj mi diris laŭte:

-- Atenton! Ĉu estas esperantistoj?

— Jes, jes! — tuj eksonis ies voĉo. — Mi estas esperantisto, — al mi proksimiĝis junulo, vestita en longa

mantelo. — Bonan tagon, samideano! — li diris.

— Kiuj vi estas kaj kien vi iras? — mi demandis.

— Ni estas francaj liberigitoj. Nin liberigis la Ruĝa Armeo. Nun ni iras al la fervojstacio por reveni Francion.

— De kie vi estas?

— Mia naskiĝurbo estas Lion.

— Ĉu vere? Mi korespondis dum du jaroj kun via samurbano!

— Kiu estas lia nomo?

— Simon Lebren.

— Mirinde!

La juna franco ekkriis ion al siaj kamaradoj, kaj ili tuj ĉirkaŭis min, laŭvice premante mian manon. Poste la franco diris:

— Vi estas Aleksandro, studento. Mia bona amiko Simon Lebren iam rakontis al mi pri vi, legis viajn interesajn leterojn. Li estis fidinda kamarado. . .

— Kial estis?!

— Ho, malfeliĉo! Lin pafekzekutis faŝisto, ĉar Simon faris propagandon utile al la Ruĝa Armeo kaj via lando. Li kredis al Rusio kaj estis centfoje prava. Nun eĉ la blindaj skeptikuloj vidis, kiel antaŭ la faŝistoj klinis kapojn multaj ŝtatoj de Eŭropo, kiel rompiĝis la demokratio, la kulturo, kiel teruro kaj mallumo de malespero paralizis Eŭropon. Nur via popolo sin montris plej fidela amiko de la libero;

Li deziris ankoraŭ ion diri, sed dum militaj renkontoj longe ne daŭras. Jen aŭdiĝis komando: „Viciĝu!“. Ni sincere adiaŭis, ĉiuj francoj denove premis mian manon.

— Baldaŭan venkon! — ekkriis la franca esperantisto, kiam mi kuris al la ekmarŝinta kolono.

Nia plotono almoviĝis tien, kie tonbris kanonoj, kie en sango kaj suferoj naskiĝis nia Granda Venko. Ĝi baldaŭ alvenis. Sed ne ĉiuj ĝisvivis ĝin. El nia triopo nur unu — mi. Ljubomir Minĉev en la konsisto de la Bulgara Armeo, kune kun la Soveta Armeo,



La jaroj malaperas kaj aperas
en pluvo, frostoj, neĝoj kaj tempest'
Kaj ĉiu nova jaro reĵiveras
soifon, dubojn al la homa est'.

Ĉar nia vivo kaj ĉi tie ĉio
sen ĉes' forbrulas kiel la kandel'.
Transvivas nur la nomo Bulgario,
grandega kiel sango aŭ ribel'.

Tra ĝi senhalte pasas kaj forpasas
postsignoj,
maltrankviloj
kaj esper'.

Ĝi tamen staras
kaj neniam lasas
situon sian sub ĉiela sfer'.

Postulo nura ĝia —
fid' konstanta.

Nadja Ĵejnova

Se mankas fid',
doloras ĝin la kor'.
La homo ja ne estas bird' migranta,
kun kiu ĝi disiĝas sen dolor'.

Al birdo mankas ĝuste fideleco,
kiu dum vintraj frostoj tenu ĝin
en tiu lando,
kiu kun varmeco
kreskigis ĝin
egale kiel nin. . .

Ho ne!
Ne mortas ĝi — la nom' Patrio.
Nenio povus ruinigi ĝin.
Ĝi estas part' de l' sanga materio,
la mank' de kiu
sufokigos nin.

El la bulgara: Tempesto

PATRIOTOJ

El mia siria taglibro

Iun vesperon miaj gefiloj iris al ki-
nejo, kaj mi restis hejme sola. Neaten-
dite venis Rafet, la servisto de mia
juna amikino Nina. Ŝi invitis min al
vespermango. Mi ĝoje akceptis la in-
viton.

Post la vespermango ni rigardis te-
levidon. Antaŭ ni, sur la malgranda
ekrano, malkovriĝis salono, ornamita
per standardoj, bildoj kaj floroj.

Okazis kunveno. Sur la scenejo ĉir-
kaŭ granda tablo sidis prezidantaro el
20—30 personoj. La granda salono es-
tis plenplena de urbanoj, vilaĝanoj,
beduenoj.

Eksonis gongo. Regis silento. Alt-
ranga oficiro ekparolis pri la milito
kontraŭ Israelo.

Ĉiuj ĉeestantoj emociiĝis kaj sincere
proponis sian materialan helpon. Ele-

partoprenis la liberigon de Hungario
kaj tie pereis en batalo.

Do, ni glori la amikojn, kiuj for-
donis siajn vivojn al la batalo kon-
traŭ la plej danĝera malamiko de la
planedo. Ili estis veraj esperantistoj!

gantaj arabaj virinoj, vestitaj tre mo-
derne, demetis kolierojn el oro aŭ pla-
teno, orelingojn kun brilantoj, brace-
letojn, fingroringojn, diversajn gemojn
kaj aliajn juvelojn. La virinoj ĵetis ilin
en korbetojn, kiujn junuloj proponis.
Inspirite de patriotismo, la tuta publiko
proponis sian helpon. Malriĉa arabo
proponis siajn lastajn 25 lirojn. Mi
estis profunde kortuŝita. Preskaŭ ĉiuj
homoj ekploris. Jen junulino aperis.
Ŝi estis maksimume 16-jara, ankoraŭ
lernantino. Bela kaj radiant, kun lon-
ga blonda hararo, ŝi eliris sur la po-
dion. Ĉiuj mutiĝis pro ŝia beleco. Eke-
stis tomba silento, kiam la junulino
ekparolis:

— Karaj geamikoj, mi devenas de
malriĉa oficista familio. En nia domo,
kiel en ĉiu araba domo, laboras nur
nia patro. Ni estas ses infanoj. Ĉar ni
havas nenion por doni en la batalo
kontraŭ Israelo, mi petas permeson,
ke mi proponu mian hararon.

Post momento du junuloj, ŝiaj fratoj,
ekstaris ambaŭflanke de ŝi, ĉiu kun

tondilo en la mano, kaj fortranĉis la hararon. En la manoj de la junaj homoj ekbrilis garbo da oraj radioj. Ĉiuj ĉeestantoj plorante salutis tutkore la junulinon. Longe oni aplaŭdis kun granda entuziasmo. La junulino preterpasis la prezidantaron, enmiksi sin inter la publiko kaj perdiĝis.

La telefono senĉese sonis. Krom la publiko en la salono, loĝantoj el la provinco proponadis per telefono sian helpon. Apud la prezidantaro staris longa vico de viroj, kiuj atendis por oferi sian monon, siajn domojn, vilaojn, aŭtomobilojn, fabrikojn, bienojn, magazenojn, ĉion, kion ili posedis. Juna

viro proponis unu milionon da liroj, alia — kvin milionojn.

Nina kaj mi ploris senĉese. Jam estis la dua horo post noktomezo. Mi ekiris al nia domo. Timigitaj pri mi, miaj gefiloj ĉirkaŭradis la stratojn por min serĉi. Rimarkinte, ke mi ankoraŭ ploras, ili demandis:

— Panjo, kara panjo, trankviliĝu! Dirudo, kio okazis al vi.

Plorante mi rakontis ĉion, kion mi vidis per la televido. La sekvantan tagon Nina vizitis nin kaj diris, ke la kunveno daŭris ĝis la tagmezo.

Aprilo, 1969
Damasko

Stanka Penĉeva

UNU MALFRUA DOLĈA AMO

Unu malfrua dolĉa amo —
samkiel pomo forŝtelita,
samkiel beno ĉe foriro,
premio laste ricevita,
branĉet' aŭtune ekfloranta,
varmeta kiel „cigansomero“¹ . . .
La dolĉan amon ni kunprenu —
ĝi nin varmigos en la tero. . .

¹ „Cigansomero“ — bulgara popola esprimo pri la lastaj varmetaj tagoj dum aŭtuno

Nevena Nedelĉeva

PATRINO

— Iliana, ĉu vi dormas? — demandis Simeon, leviĝante iom el sia lito, kaj klinis la kapon al sia edzino.

— Ne, kara mia, — ŝi respondis.

— Ankaŭ mi ne povis ekdormi, sed mi volas demandi vin, ĉu vi sentas vin bone?

— Jes, tre bone. Mi estas feliĉa.

— Vi estas tre bonkora, Iliana!

— Ne, mi estas nur patrino.

Li profunde sopiris.

— Kial vi sopiras?

— Tute kontraŭvole, mia kara, — li respondis kaj kuŝiĝis en sia lito.

Inter la du litoj, kiuj estis metitaj

angule, estis korbeto, en kiu dormis la bebo — ilia eta filineto Ani. Kaj en la lito, ĉe Iliana, dormis Ivo, la 6-jara filo de Simeon, kiun ili hodiaŭ revenigis el infana sanatorio.

Kelkajn monatojn antaŭ la naskiĝo de Ani, Iliana, eble ne povante dormi trankvile dum la nokto pro sia iomete peza sanstato, ofte diris al la edzo:

— Se mi estos viva kaj sana, post la nasko de la infano ni nepre iros por repreni Ivon.

— Bone, bone, — respondis Simeon, — ni havas tempon. Tie li fartas tre bone. La naturo estas belega.



La sanatorio troviĝas sur malalta montodeklivo.

— Sed vi diris al mi, ke la infano ĉiam demandas vin pri la patrino.

— Jes, kaj li ĉiam atendas ŝin kun granda senpacienco.

— Finfine, la patrino devas iri al li. . . kaj alvenigi lin hejmen.

Simeon silentis.

— Kial vi ne respondas? — ŝi demandis. — Cu mi ne povas esti ankaŭ lia patrino, kiel al la infano, kiun mi atendas?

— Sed vi estas juna. . . vi studas, vi devas prepari vin por la ekzamenoj.

— Tio ne malhelpos min. Kontraŭe, mi estos trankvila. Ĉiun nokton, ne povante dormi, mi pensas multe, multe. Kaj kiam mi decidis alkonduki Ivon hejmen, mi trankviligis.

Karesante ŝian hararon, li promesis plenumi la deziron de ŝia edzino. . .

Kiam Simeon renkontis kaj ekamis Ilia-n, komence li ne diris al ŝi, ke li havas filon, kiu loĝas ĉe ŝia avino en malproksima vilaĝo, trans la Balkanmontaro. Poste, vidante ŝian bonkorecon, li rakontis al ŝi pri ŝia unua edzino kaj pri la infano.

— Ĉu vi ankoraŭ amas ŝin? — ne atendite Ilia-n demandis Simeon, vidante ŝanĝon en liaj okuloj.

— De kiam mi renkontis vin, via ĉeesto trankviligis min, kaj iom post iom mia konscio liberiĝis de ŝi. Sed iam mi tro, tro multe amis ŝin. Ŝi estis belega, ĉarma, vivoplena, dancema, sed, bedaŭrinde, havis tre ŝanĝiĝeman karakteron. Ŝi rapide enamigadis... Ŝia tuta estaĵo brulis. Ŝi estis senĉese gaja, kaj faris la viron, kiun ŝi amis, feliĉa. Sed poste, kun la sama sincereco, kun kiu ŝi estis dirinta, ke ŝi amas iun per ŝia tuta estaĵo, ŝi povis diri: „Mi ne estas kulpa, mi ne povas plu ami vin. KREDU min. . . mi ne povas“. Post nia eksedziĝo ŝi edziniĝis denove al fremdulo kaj forlasis nian landon.

— Kaj la infano? — ekdemandis Ilia-n.

— La infano ne estis ĉe ni. Mia

patrino prizorgis ĝin en la vilaĝo, de kiam li estis okmonata. Sed ĉiam, kiam li vidis sian patrinon, li ne povis disigi de ŝi. Li havis grandan deziron, neceson esti amata, karesata de ŝi, sed ŝi ne havis tempon por tio. Ŝia atento estis ĉiam okupata pri ŝi mem. Li estis trijara, kiam ŝi foriris. . .

Lastatempe, eble pro malsato pri patrina amo aŭ pro alia kaŭzo, Ivo malsaniĝis. Lia pulmo estis en ne sufiĉe bona stato, kaj la kuracisto rekomendis, ke li estu kondukita al infan-sanatorio. . .

Post tiu interparolo Ilia-n ne plu demandis lin pri lia pasinteco.

En la korbeto la malgranda Ani ekploris.

— Ripozu, Ilia-n, — diris Simeon levigante el la lito, — mi kvietigos la filineton.

Li prenis la infanon kaj paŝante tra la ĉambro lulis ŝin en siaj brakoj. Fine Ani denove ekdormis. Li remetis ŝin en la korbeton, kisis sian edzinon kaj kuŝiĝis en sian liton.

— Panjo, — aŭdis Ilia-n la flustron de Ivo, — mia kara panjo! — Kaj li ĉirkaŭprenis per la du manetoj ŝian kolon. — Vi estas ĉe mi, panjo!

— Jes, mia infano, — kisis Ilia-n lian vangon.

— Panjo, ĉu mi restos ĉe vi?

— Jes, infano mia.

— Kaj ĉu mia avino ne rekondukos min al la vilaĝo?

— Ne, infano mia, vi ne plu iros vilaĝen.

— Kaj al la sanatorio?

— Ne, mia infano!

— Kaj mi restos por ĉiam ĉe vi?

— Por ĉiam, infano mia. — Ŝi ĉirkaŭbrakis la knabeton.

— Panjo, mia dolĉa panjo, mi tiel longe atendis vin. . .

— Sed mi atendis vian malgrandan fratineton. . . Kaj krome, mi lernis, mi havis ekzamenojn. . . Tial mi ne povis pli frue veni al vi.

(Sekvas sur p. 28)

Jam pasis for la tagoj ĉe la maro,
sed restos ĉiam en la koro
feliĉa rido kaj kantado,
someraj, suna rememoro.

Karesas nokte min en sonĝo mia
subita sala mara vento.
Mi ridas en la bela sonĝo,
sed vane trompas min la sento.

Mi revas pri l'someraj varmaj tagoj,
kiam la gajaj voĉoj de l'anaro,
ekflugos kiel blankaj laroj
ĉe l'bordo de la Nigra Maro

kaj kiam ree en la vento flirtos
la verda stelo de l'standardo,
kaj ree frata amo unuigos
la plurnaciajn anojn de l'brigado.

LINGVAJ DEMANDOJ

INTERLINGVISTIKA UTOPIISMO

De prof. d-ro STOJAN ĜUĜEV, membro de la Akademio de Esperanto
(Daŭrigo el n-ro 6)

Oni proksimume scias, kiamaniere formiĝas la unua kaj la dua konsistelementoj de la lingvo — la morfologio (la gramatika sistemo) kaj la leksika fonduso (vortaro). Ilin povas elpensi, komponi aŭ kompili iu individua persono, iu kolektivo de sciencistoj (komisiono), eĉ iu cibernetika maŝino (komputilo). Laŭ simila maniero Zamenhof kompilis la Fundamenton. . . Sed la trian komponanton — la socian organismon — de la lingvo povas verki nek individua aŭtoro, kiom ajn kompetenta li estas, nek komisiono de fakuloj, nek cibernetika maŝino. Ĝi estas rezulto de longa kolektiva laboro fare de la tuta socia organismo. Kiel do estiĝis la kohera, dinamika, kreopova kaj entuziasma Esperanto-popolo — tiu ĉi unika socia organismo, kiu ekparris la internacian lingvon de Zamenhof, blovis al ĝi sian spiriton, dediĉis al ĝi sian koron kaj sian animon, adoptis ĝin kiel esprimilon de siaj pen-

soj, sopiroj, espero kaj idealoj, oferis por ĝi sian tempon, sian havaĵon, eĉ sian vivon? — Tio ĉi estas la sekreto de la sukceso de Esperanto kaj de ĝia venko kontraŭ ĉiuj projektoj de internacia lingvo. Tiu ĉi sekreto estas eksplikebla ne per la supereco de Esperanto, ne pro la pli granda perfekteco de ĝia gramatika sistemo kaj ĝenerale ne pro lingvistikaj, sed pro sociaj kaŭzoj. Aŭ, kiel tre prave atentigas Grosjean Maupin: „... La Ido-ĉefoj, perdinte la esperon pri triumfo de sia afero kaj estante tre miopaj por vidi la sociajn kaŭzojn de la fiasko, komencis serĉi ties kaŭzojn en la lingvostrukturaj mankoj de Ido. Rezulte aperis dudeko da novaj lingvoprojektoj, kies aŭtoroj sin lasis rekonduki en la epokon de *la individuisma utopia projektado*. Ili ne povis rekoni la eble plej genian principon de Zamenhof: fari nur fundamenton kaj lasi al kolektivo la ellaboron — la konstruon

— Ankaŭ paĉjo tion diris al mi. . . Sed mi, mi ĉiutage atendis vin.

— Mi sciis tion, infano mia, kaj mi ankaŭ suferis pro vi.

— Panjo, mia dolĉa panjo! — premis per siaj manetoj Ivo la kolon de

Iljana. — Vi diris, ke mi restos por ĉiam ĉe vi? Ĉu vere?

Ferminte denove la palpebrojn, li feliĉe aŭdis la respondon:

— Vere! Por ĉiam, infano mia.

de la lingvo-palaco“.

La kredo, ke iu profesia lingvisto aŭ ke iu komisiono de kompetentuloj povus neglekti la faktoron „socio“ kaj komponi „maksimume perfektan“ internacian lingvon sendepende de la vastaj popolamasoj, kaj ĝenerale la subtakso de la rolo de la kolektivo en la procezo de la lingvokreado estas konsekvenco de la utopiista historia koncepto, laŭ kiu la evoluo de la socio, inkluzive de la lingvo kiel esence socia institucio, estas determinata ne de la agado de la socio, sed de la volo, de la kapabloj, de la bonhumoro kaj ofte de la kaprico de la „grandaj homoj“; ke la historion kaj ĝiajn instituciojn (inkluzive la lingvajn) kreas ne la vastaj popolamasoj, sed la eminentuloj, la estroj, la elituloj, la ĉefoj, la kompetentuloj ktp. Tiu ĉi koncepto troviĝas en flagra kontraŭdiro kun la elementaj principoj de la sociologio kaj de la marksismo, kiu jam antaŭ cent jaroj demonstris, ke eĉ la sperto de la plej genia individuo ne povas egali kaj anstataŭi la kolektivan sperton de la milionaj popolamasoj.

Efektive, Zamenhof havis tre klaran konscion pri la rolo de la socia faktoro en la procezo de la lingvo-estigo. Li konceptis, ke la estigo de la lingvo kaj la estigo de la socia organizmo (popolo) estas unu sama procezo, unu sama fenomeno; kaj ke la evoluo de la lingvo okazas paralele kaj depende de la evoluo de la socio. Ĉar ne estas ie ajn sur la tero lingvo sen socio, nek socio sen lingvo. Kaj li ankaŭ konceptis, ke Esperanto fariĝos reala, vivanta, efektiva lingvo nur kiam ĝi estigos sian vivantan popolon, sian socian bazon, sian movadon. En tiu ĉi koncepto kuŝas la sekreto de lia sukceso, de la venko de Esperanto kontraŭ ĉiuj lingvoprojektoj.

Krei popolon, socian bazon, movadon... jes... Sed ĉu tio estas facila tasko? Kiel estiĝas la popoloj?

Permesu al mi mallongan ekskurson

al la novelo „Mia Dagestano“ de la nuntempa soveta verkisto Rasul Gamzatov. La aŭtoro priskribas la manieron, laŭ kiu kreiĝis la dagestana popolo:

„Dum pluva aŭ dum bela vetero iu energie kaj insiste ekfrapas nokte sur la fenestron de silenta, kviete dormanta vilaĝa domo.

— Hej! Ĉu estas viro tie ĉi? Selu tuj la ĉevalon!

— Sed, kiu vi estas?

— Nu, se vi demandas, kiu mi estas, restu hejme! Vi ne taŭgas por la afero!

Kaj denove sur fenestron de alia domo: tik, tik.

— Hej, ĉu estas viro en tiu ĉi domo? Selu tuj la ĉevalon!

— Por kien? Kial?

— Nu, ĉar vi demandas „kien“ kaj „kial“, restu hejme! De vi utilon oni ne atendas.

Trian fojon oni frapas sur fenestron de alia domo.

— Hej! Ĉu estas viro en tiu ĉi domo? Selu tuj la ĉevalon!

— Bone! Tuj! Mi pretas!

— Nu, tio ĉi estas viro, tio ĉi estas montarano!

Kaj ambaŭ daŭrigis la frapadon: „Tik, tik. Ĉu estas viro tie ĉi? Selu tuj la ĉevalon“!

Kaj jen: ili ne plu estas du, ne plu estas tri, ne plu dek, sed centoj, miloj. Ĉe unu aglo alflugas alia aglo, post unu homo ekiras alia homo. Tiel estiĝis la popolo de Dagestano“ — konkludas Rasul Gamzatov².

Estas iom da vero en tiu ĉi dagestana fabelo. Ĝi malkaŝas iujn elementajn formojn de la etnogenezo kaj per metaforaj bildoj montras, kiamaniere ekestas la malgrandaj sociaj organismoj, la malgrandaj popoloj. La kreiĝo de la dagestana popolo prezentas certan analogion kun la kreiĝo de la esperantista socio, de la Esperanto-popolo kaj movado. Zamenhof, vekanto de la mondlingva konscio ĉe siaj samtem-

puloj, agis ne nur kiel lingvisto (gramatikisto, vortaristo ktp), sed ankaŭ kiel sociologo-praktikisto. Simile al la heroo de Gamzatov li frapis sur plurajn fenestrojn, renkontis multajn hezitojn, apatiojn, rifuzojn, mokojn, antaŭ ol trovi la *duan* esperantiston. Hodiaŭ, kiam multaj miloj da „samideanoj“ parolas, skribas, legas, kantas, uzas la Internacian Lingvon tra la tuta mondo, ne estas tiel malfacile persvadi iun personon ellerni Esperanton kaj eĉ fariĝi pioniro de ĝia Movado. Sed tute alia estis la situacio en la frua, en la „heroa“ epoko de la Esperanto-movado. Tiam neniuj serioza persono estis ĉi tie perdi sian tempon por lerni lingvon, kiun neniuj parolas, kiu ekzistas reale nenie en la mondo! La plej grava kaj la plej malfacila problemoj por Zamenhof en tiu epoko estis konstitui la socian bazon de sia projekto, gajni la konfidon de la unua persono, kiu konsentus lerni Esperanton. Ambaŭ ili daŭrigas la „frapadon“, la varbadon. Post novaj malsukcesoj aperas la tria apostolo, poste la kvara, la kvina ktp... „Ĉe unu aglo alflugas alia aglo“, post unu mondlingvano ekiras alia mondlingvano: Grabowski, Belmont, Zakrzewski, Wasniewski, Robin, De Waal, Lojko, Hofman, Evstifijev, Devjatnin, Borovko, Gernet... Konstituigis la unua kerno de la Esperanto-popolo, la socia komponanto, la karno kaj la sango de la *lingvo* Esperanto.

Hodiaŭ tiu ĉi popolo, kvankam ankoraŭ relative ne multnombra, posedas neordinaran energion kaj klaran konscion pri sia hela, glora estonteco. Stranga popolo! Neekstermebla popolo! Nevenkebla popolo! Oni kru-cumas ĝin en Eŭropo, ĝi reviviĝas en Aŭstralio. Oni persekutas ĝin en Germanio, ĝi reaperas en Japanio. Oni provas ĝin estingi en Hispanio, ĝi ekflamas en Brazilo. Oni ne forgesu ankaŭ, ke la socia bazo de la internacia lingvo Esperanto formas ne nur la vivantaj esperantistoj; nian popolon

formas ankaŭ niaj mortintoj: Zamenhof, Boirac, Cart, Carlo Bourlet ktp. Ili konstituas la spiritan grundon de nia Movado.

Konkludo

En lasta analizo la problemoj de internacia lingvo ne estas nur problemoj de belsonco kaj estetiko. Ĝi ne estas eĉ nur problemoj de filologio, de leksikologio, de gramatiko aŭ de pura lingvistiko. Male, ĝi estas eble 89% problemoj de sociologio, de ekonomio, de ekologio, de politiko, eĉ de biologio (problemo pri la postuloj de la *vivo* mem — en la plej larĝa senco de tiu ĉi vorto), 10% problemoj de lingvistiko kaj nur 1% problemoj de estetiko. Tio ĉi signifas, ke kiam starigas demando pri la neceso de lingvo internacia kaj pri la kondiĉoj de ĝia adopto fare de la larĝaj popoloj, la konsideroj el sociologia, ekonomia, politika, ekologia kaj biologia vidpunktoj estas pli urgaj ol la konsideroj mallarĝe lingvistikaj, pure filologiaj kaj estetikaj.

El ekonomia kaj sociologia vidpunkto oni ne povas, oni ne rajtas neglekti la cirkonstancojn, ke la evoluo de la produktivaj fortoj en la nuntempa socio — en la epoko de kaptunaj rapidecoj de la komunikado — jam de longe anticipis la disvolviĝon de la produktadaj interrilatoj, kiuj malfruas kaj konsiderinde postrestas en sia progresado pro gravaj malfacilaĵoj de interkomprenado inter la popolamasoj el diversaj landoj. Stranga paradokso: la malrapidaj interpopolaj rilatoj pro ĉiama prokrasto de la adopto de internacia lingvo bremsas la disvolviĝon de la produktivaj fortoj kaj malhelpas la normalan evoluon de la moderna socio. Kaŭzo de tiu ĉi prokrastado estas la regantaj lingvistikaj antaŭjuĝoj en la intelektulaj sferoj kaj unuavice la antaŭjuĝo pri la lingva estetiko kaj perfekteco. Tio ĉi estas specoj de interlingvistika utopiismo, kiu mal-



helpas la normalan evoluon de la moderna socio.

Oni devas do alpreni pli realisman vidpunkton, kiam oni decidas solvi la mondlingvan problemon. Ĝia solvo ne plu permesas prokraston pro abstraktaĵoj, diskutindaj lingvistikaj, subjektivaj, estetikaj aŭ sentimentalaj, ĉiukaze ne-realismaj konsideroj. Kiel en la artoscienco (teorio kaj historio de la arto) la slogano „arto por arto“ — la pura estetismo — kaŭzis gravajn konfuzojn en la konceptoj de multaj artistoj kaj verkistoj, tiel same la slogano „lingvistiko por lingvistiko“, t. e. „absoluta perfektigo de la lingvo antaŭ ĝia uzo“, kiu estas speco de lingvistika estetismo (Wilde-ismo), havas nenian praktikan valoron por la solvo de la mondlingva problemo.

Ni, la esperantistoj, ĉiuj arde strebas al la belsoneco de nia Esperanta prononcado, al ĉiam pli alta perfekteco de nia kara lingvo; ni ĉiuj konsideras la estetikan valoron de Esperanto kiel problemon de esperantista digno kaj

kiel plej gravan taskon, devon de ĉiu Esperanta verkisto, poeto, kantisto, oratoro aŭ aktoro — eĉ de ĉiu ordinara *uzanto* de la Internacia Lingvo. Sed la estetikaj aŭ eĉ mallarge subjektivaj estetikaj konsideroj ne devas esti kaŭzo aŭ motivo por forlasi nian realisman vidpunkton kaj ekŝvebi super la nuboj de la utopiismo, — neglekti la sociologiajn, ekonomiajn, ekologiajn, la politikajn kaj „biologiajn“ konsiderojn.

La mondlingvanoj kaj la interlingvistoj ne devas, ne rajtas oferi sian mondlingvon, detrui la majestan konstruaĵon kaj konsideri nulo la gigantan okdekjaran laboron kaj batalon de la Esperanto-pioniroj — nur por konformiĝi al la estetisma dogmo de Oscar Wilde. Se la absoluta, maksimuma „estetismo“ en la arto transformas ĝin en bagatelemen kapricon de psikopatoj, kiel la morfinismo, la homoseksualismo k. c., la slogano „unue perfektigo, poste disvastigo“ kondukas al la marĉo de la interlingvistika utopiismo.

(Fino)

POR VIA LINGVA PERFEKTIĜO

NE TIEL, SED TIEL ĈI!

Neniu, eĉ plej nova esperantisto, kontestas la simplecon de la gramatiko de Esperanto, sed samtempe neniu povas nei la jenan fakton: malgraŭ sia simpleco, Esperanto prezentas ankaŭ seriozajn malfacilaĵojn por ĉiuj, kiuj ne akiras la necesan por ĉiu lingvo spertecon.

La celo de nia rubriko estas: popularigi iujn interesajn ekzemplojn de bona kaj malbona stilo por praktike helpi al la elekto de korektaj esprimoj, forigi iujn tipajn gramatikajn erarojn, atentigi pri kutimaj kaj ofte renkontataj eraroj speciale ĉe bulgaroj sub la influo de nia gepatra lingvo ktp. Ni

utiligos bonajn lernilojn de konataj aŭtoroj.

Ni intence elektis por tiu ĉi rubriko la titolon „NE TIEL, sed TIEL ĈI!“, prunteprenante ĝin de la populara libro sub la sama titolo de F. Faulhaber, membro de la Akademio de Esperanto.) Lia verko bedaŭrinde (pro valutaj kaŭzoj) ne povus atingi pli vastajn rondojn en nia lando. Jen kial ni popularigos almenaŭ parton de la riĉa enhavo de tiu valora helpilo. En ĝi la aŭtoro kolektis vortojn kaj esprimojn el diversaj Esperantaj eldonaĵoj. Uzante la principon de komparado, li antaŭgardas la leganton ripeti certajn erarojn kaj

instruas al ni belan, korektan, klaran Esperantan stilon, malkaŝante la vere riĉajn eblecojn de la gramatiko de Esperanto. Faulhaber: „bona stilo estas

belsona, klara, simpla, logika, senbalasta, varia, en harmonio kun la temo“.

Jen kelkaj ekzemploj, kiujn ni prunteprenas de Faulhaber.

Interpuŝigo de sonoj ne facile elparoleblaj

Se eble, evitu tian interpuŝigon de sonoj, kiuj ofendas niajn orelojn, mal-

faciligas la elparoladon, kaŭzas malklarecon aŭ miskomprenon:

A

NE TIEL. . .

lingvuzo
lingvekzerco
urbplaco
sorbpapero
ŝarĝĉevalo
lasttempe
leglibro
rabbesto
atendĉambro
akvfalo
ĉerizsuko
ovforma
nigrhara
larĝŝultra
de l'avo
de l'libro

B

SED TIEL ĈI

lingvouzo
lingva ekzerco
urboplaco, urba placo
sorba papero
ŝarĝoĉevalo
lastatempe, en la lasta tempo
legolibro
rabobesto
atendejo
akvofalo
ĉeriza suko
ovoforma
nigrahara
larĝaŝultra
de la avo
de la libro

En la sekvaj numeroj ni daŭrigos la aperigon de la rubriko.

Nevenka Aleksieva

LETERO DE L. L. ZAMENHOF AL MILOSLAV BOGDANOV

Kiel oni scias el la historio de la internacia E-movado, la plej malfacila periodo en ĝia vivo estis nome la pionira periodo. Necesis gigantaj klopodoj de apartaj personoj en diversaj landoj, por ke oni venku la multajn obstaklojn, kaj antaŭenpuŝu la disvastigon de la juna internacia lingvo Esperanto. En tiu ege respondeca periodo multon faris d-ro Zamenhof mem por faciligi la agadon de la malmultnombraj pioniroj, dissemiĝantaj precipe en eŭropaj landoj.

La ĉi-suba letero de d-ro Zamenhof estas adresita al unu el la pioniroj de la E-movado en nia lando — Miloslav Bogdanov, aŭtoro de la unua Lernolibro de Esperanto por bulgaroj. Tiu letero montras, kiel zorgeme, kiel patrece, saĝe kaj singarde Zamenhof rilatis al la agado de siaj samideanoj-esperantistoj, por ke ties klopodoj donu maksimuman pozitivan efekton por la ĵus naskiĝinta movado de Esperanto.

Tre estimata sinjoro!

Kun plezuro mi vidis el via letero, ke vi intencas fondi gazeton en nia lingvo sub la titolo „Espero“. Mi deziras al vi plej bonan sukceson kaj mi esperas, ke via gazeto trabatos

larĝan vojon al nia afero en via lando. Kio dependas de mi, mi kun plezuro ĉiam farados por via gazeto kiom mi povas kaj mi volonte estas preta de tempo al tempo sendi al vi artikole-



tojn por via gazeto. Sciigo pri via fondota gazeto estos donita en n-ro 10 de la „Esperantisto“. Por ke la nova gazeto bone plenumu sian difinon, estus utile, ke ĉiu peco en ĝi estu donata samtempe en lingvoj Esperanto kaj bulgara.

Antaŭ ol vi komencas la eldonadon de via gazeto, mi devas al vi memori la jenon: la eldonado de gazeto en nia lingvo estas afero tre utila, kaj vi meritos per ĝi la dankon de ĉiuj amikoj de nia ideo; sed ĝi estas ankaŭ afero tre malfacila, postulas energion, fortan volon kaj oferecon, ĉar nia afero ne estas ankoraŭ sufiĉe forta en via lando, por ke via gazeto jam en la komenco povu materiale sin teni. Konstantaj oferoj moralaj kaj materialaj de via flanko estas postulataj, por ke via gazeto povu sin teni kaj trabi la vojon por nia afero. Se vi ne havas la decidon kaj la eblon stari forte kaj regule kaj pacience daŭrigi la eldonadon de la gazeto almenaŭ en daŭro de unu jaro malgraŭ

ĉiuj perdoj kaj malfacilaĵoj, — tiam estos pli bone, se vi la gazeton tute ne fondos; sed se vi sentas en vi la kapablon energie batali kaj malgraŭ la perdoj stari kelkan tempon forte kaj konstante, tiam pli aŭ malpli frue via laborado alportos la plej dolĉan rekompencan, ĉar vidante poste en via lando la grandan nombron de niaj amikoj, kreitaj per via pacienca laborado, vidante la floradon de la gazeto, kiu en la komenco tiel malfacile batalis, vi povos diri al vi, ke vi estis por via lando efektiva apostolo de la bona afero.

Vi devas forte peni, ke la parto Esperanta en via gazeto havu ĉiam tute puran kaj bonan stilon. (La „Mondlingvisto“¹ forte pekis de tiu ĉi flanko). Estus tre bone, se vi volus ĉiun numeron sendi al mi por korektado antaŭ ol ĝi estos presita. Mi volonte prenos sur min tiun ĉi laboron.

Koran saluton al vi kaj al via klubo

de via L. ZAMENHO

El tiu ĉi letero ni konstatas, ke d-ro L. L. Zamenhof estis bonege informita pri la E-aferoj en Bulgario. La sobra kritiko, la kuraĝigaj konsiloj kaj kortuŝa preteco helpi parolas pri la frateca rilato al la juna movado de Esperanto en Bulgario. El la respondo al Zamenhof oni ekscias, ke tiu estis la 17-a letero de Zamenhof al Bogdanov. Per si mem la fakto, ke en daŭro de iom pli ol 3 jaroj estis interŝanĝitaj po 17 leteroj, aŭ entute 34, elokvente evidencigas la daŭran intereson kaj deziron de Zamenhof pri kunlaboro kaj interŝanĝo de spertoj kun la pioniroj de la E-movado en Bulgario.

Canko Murgin

¹ „La Mondlingvisto“ — la unua E-gazeto en Bulgario, eldonata de Miloslav Bogdanov, kaj dua en la mondo — post la „Esperantisto“ de Zamenhof.

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario kaj korektanto: Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-90-29

NE PLU KIEL GIS NUN!

Ĝis nun granda parto de la bulgaraj esperantistoj kutimis aboni nian asocian arganon post la oficiala limdato, fiksita de la poŝtoj. Tion ili faris pere de la asocia kancelario. Por 1976 jaro tio tamen ne plu estos ebla!

La limdato por abono de „Bulgara Esperantisto“ por 1976 estas la 1 de decembro. La eldonkvanto estos strikte fiksita — NUR TIOM, KIOM DA ABONANTOJ KOLEKTOS LA POŝTOJ! Do estas klare, ke se oni daŭrigos la ĝisnunan praktikon, ni riskas serioze malgrandigi la eldonkvanton, kaj multaj esperantistoj restos sen la revuo.

Tial ni insiste rekomendas la jenon: ĉiu distrikta komitato de BEA kaj ĉiu Esperanto-societo TUI nomu respondeculon pri la abonkampanjo kaj sciigu lian nomon, adreson, kaj eventuale telefonnumeron al nia redakcio.

Ĉiu respondeculo devas peti kvitancarojn el la loka poŝtoŝicejo, disdoni ilin al konvenaj helpantoj (se necese), observi ilian laboron kaj mem kolektadi abonojn.

Ĝis la fino de ĉiu dua semajno li informu la respondeculon ĉe la Distrikta Komitato, kiom da abonoj estas kolektitaj ĉe la societo, tiu lasta sumigu la rezultojn kaj informu la redakcion pri la stato en la tuta distrikto. La redakcio ĉiutage observos la marŝon de la abonkampanjo.

Devo de ĉiu bulgara esperantisto estas kolekti laŭeble pli da abonaj. La plej bonaj agantoj — unuopuloj kaj kolektivoj — dum tiu nobla konkurado estos premiitaj morale kaj materiale laŭ la ĝisnuna praktiko — per la Verda Tabulo, honorflagetoj, libroj ka.

Gekamaradoj! La sukceso dependas nur de ni mem!

Al sindona kaj obstina laboro por brilaj sukcesoj en la abonkampanjo de nia asocia organo por la antaŭstaranta kongresa jaro 1976!

Ni nepre atingu 5000!

deziras korespondi

Pollando

Elzbieta Dabłowska — ul. Grażyny 9/18, 20-605 Lublin (18-jara lernantino—muziko bk, esperantajoj).

Kowal Margarita — ul. Wojska Polskiego 27-a, 37-200 Poznań (17-jara—kantoj, filatelo, aŭtomobiloj k. a.)

Gregor Sanetra — Wieprz 199, 34-382 Sywiec (15-jara lernanto — muziko, bk, pm sporto).

Roman Janosz — LO 23-300 Janów Lub (17-jara lernanto — sporto, Esperanto, bk.).

Bożena Mavek — Bawoszyce 11-200, ul. Ketrzyńska 28/3, woj. Olsztyn (11-jara oficistino — kino, teatro, danca muziko, dk—kun bulgaroj).

Sovetunio

Grupo de novaj esperantistoj, 15—16-jaraj — kun ĉi pri ĉi. Skribu al ilia gvidanto: 483 310 Kazaĥa SSR, Talgar 2, Komunističeskaja 278, Gercikov Grigorij.

Gercikov Iljuĉjo (adreso la supra) — 9-jara — kun samaĝuloj el ĉi.

Tanja Muzika — 270 068 Odesa, pr. Dobrovolskogo 151/1 kr. 199 (13-jara — kun ĉi pri ĉi, interŝanĝas poŝkalendaretojn).

Kuraĝigu novefonditan E-rondeton de lernantoj, korespondu kun ĝiaj membroj. Komuna adreso: USSR, Kutaŝi, str. Ŝaumiana 1, Ŝkola № 10, Esperanto-klubo.

Viktor Poljakov — a/k № 178, Barnaul 38, 656 037 USSR (27-jara inĝeniero-konstruisto — kun ĉi pri lingvoj, arkitekturo, popolkutimoj ktp; interŝanĝas bk, pm, insignojn, kalendaretojn, revuojn pri modo, arkitekturo, humuro).

Saudargas Juozas — Kretinga, Tarybine aikšte 2-1, Litovio 235 700, USSR (studento — kun ĉi pri ĉi, kolektas pm, gram. diskojn).

La membroj de novefondita E-rondeto en mezlernejo dez. korespondi tutmonde pri ĉi. Skribu al komuna adreso: USSR, Litovio, 234 950 Troŝkinai, mezlernejo, Esperanto-rondeto.

Leili Linnas — str. Mae 14-2, 202 900 Viljandi, Estonio (25-jara s-anino, ŝoforo — pri literaturo, turismo, interŝanĝas pm, kolorajn bk).